

SAL GUTARIAN

6-11

HUNGARA VIVO

I
1978
8 Ft

KOMENCU ĈE SKÁLA!

SKÁLA

VARSKALO

NI ATENDAS VIN

de la 7-a horo
ĝis la 20-a horo

en nia nutraĵ-sekcio

de la 8-a horo
ĝis la 19-a horo

en nia sekcio
de multspecaj
industri-varoj

Kliento-servo: 850-850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XVIII. jaro 1978. Nro 1 (77)

ENHAVO

Klement, T.: Intervjuo kun d-ro *Károly Polinszky (Rados, P. A.)* 2
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo I. Antikva historio, patrujokupo (*VHZS*) 4
Fenyvesi, E.: Lajos Kossuth 6
Kossuth L.: Parolado en Manĉestro 8
Szenes, I.: Sindikata kaj kooperativa iniciato 9
Timmer, J., Méhes, L., Szabó, I., D-ro Molnár, F.: „Ni pretas por amika kunlaborado . . ." 10
József, Attila: Pri la profito de kapitalisto (*Fejes, M.*) 11
Szabó, E.: Radnóti 11
Tornado, B.: Poeto de sento profunda 12
Ĥoĥlov, N.: Viburno, Vintra fabelo, Eŭropo 12-13
Tammsaare, A. H.: Reveno el la malliberejo (Fragmento el la romano „La mastro de Korboja") 14
Tyblewski, T.: Skizo pri Esperanta romano 17
Benczik, V.: Libroprodukto kreskas 19
Morgan, E.: La unuaj homoj sur Merkuro (*Auld, W.*) 19
Farkas, É.: Panoramo 20—21
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
Benczik, V.: La poŝo de la civitano 24
D-ro László, F.: La situacio kaj evoluado de ŝirmado kontraŭ inundoj en Hungario. (*Pechán, A.*) 26
Esperanto-vivo. Internacia literaturkonkurso „Larius" 31
Fenyvesi, E.: Literatura metiejo 32
Recenzoj (*Mihalkov, Benczik, Varga-Haszonits*) 33
Gáll Zs.: Inter du horizontoj 37
Krucenigmo, Lingvaj ludoj 37
Ŝako 39
Leterkesto 40
Korespondi deziras 40

Sur la titolpaĝo: Pentraĵo de György Vastagh pri Lajos Kossuth

Oni jam formetis la skiojn...

almenaŭ ĉi tie, en Meza Eŭropo, kiam tiu ĉi numero trafos en la manojn de la legantoj, kvankam ĝi devus servi kiel amuzo en bone hejtita ĉambro dum plena vintro. La malfruon, kiel ankaŭ tiun de la nro 1977/6, kaŭzas paneo en la presejo. Ni mem bone konscias, ke tio estas netolerebla stato, kaj promesas, ke HV baldaŭ reprenos sian tradician regulan aperritmon, eĉ se ni devas ŝanĝi presejon por tio.

Tamen, eble estis konsole, ke la malfrue elirinta nro 1977/6 havis —almenaŭ laŭ nia trovo — tre belan aspekton. Ni faros nian eblon por ĝojigi nian vastiĝantan legantaron pli ofte per plurkoloraj kovrilpaĝoj. Tio certe kontribuos ne nur al la prestiĝo de HV, sed ankaŭ al tiu de la tuta esperanta gazetaro.

Ĉifoje estu konsolo pro la malfruiĝo alia agrabla novaĵo: ekde nun HV aperos sur 40 paĝoj, anstataŭ la ĝisnunaj 32. Tio signifas 25%-an ampleksiĝon, kaj — ne malgrava afero — *la abonprezo de la revuo restas senŝanĝa.* Io tia estas iom nekutima afero en la nuna inflaciema mondo, ĉu ne?

En la supra maldekstra angulo de tiu ĉi paĝo vi povas legi, ke la jena numero de HV estas la sepdek sepa en la vico. Simile al la praktiko de multaj aliaj revuoj, ni decidis doni ekde nun (interkrampe) tiun indikon, por atentigi pri la vojo, kiun faris nia revuo. Per simpla aritmetika operacio evidentiĝos, ke ĝis nun presiĝis entute 2432 paĝoj de HV, ne enkalkulante tiun ĉi numeron. Tiu fakto montras, ke niaj abonantoj donis sian fidon ne al eferema entrepreno.

La nuna numero laŭ la enhavo ne estas io eksterordinara: simple ni klopodis liveri bonkvalitajn, informriĉajn kaj variajn legaĵojn. Fidele al nia ĝisnuna principo, ni deziris informi pri nia lando ĝenerale, pri la poresperanta agado en Hungario kaj aliaj landoj, klopodante doni ne malgrandan spacon ankaŭ al la propre esperanta kulturo.

Tamen mi volus atentigi pri kelkaj artikoloj. La unua estu la komenciĝanta serio *Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo.* Ni esperas, ke la artikoloj (kaj ilustraĵoj) de tiu ĉi serio helpos al niaj legantoj en la kompreno de la hungara kulturo.

Rajte povas kalkuli pri interesiĝo ankaŭ la intervjuo, farita kun d-ro Károly *Polinszky*, hungara ministro pri edukado. Ni tre ĝojus legi baldaŭ similajn intervjuojn de *alilandaj kolegoj de d-ro Polinszky.*

Ni primemoras ankaŭ du datrevenojn. La estona romanisto *Tammsaare* naskiĝis antaŭ cent jaroj, kaj ni profitas tiun okazon por atentigi pri lia esperantigita verko *La mastro de Korboja.* La alia primemoro ligiĝas al la esperanta poeto N. *Ĥoĥlov.* Ŝatantoj de la moderna prozo ne preteratentu la originalan verkon de la debutanta Zsolt *Gáll.*

Timante la tondilon de la enpaĝigisto, mi finas. Se vi trovis tiun ĉi redaktoran babiladon enuiga, tuj foliumu plu: sur la ceteraj paĝoj atendas vin verkoj el plumoj pli spertaj. Bonan legadon!

D-ro Károly Polinszky, ministro pri edukado de Hungario

Intervjuo kun D-RO KÁROLY POLINSZKY ministro pri edukado de Hungario, PRI PROBLEMOJ DE LA INSTRUADO DE FREMDAJ LINGVOJ KAJ PRI ESPERANTO

„Estas tre strange, kiam antaŭ ni staras homo, kiu laŭ vizaĝo, laŭ pensmaniero tute similas nin, sed li komencas vortgalopi, kaj ni ne komprenas eĉ unu el liaj vortoj; aŭ eble ni trovas libron, enhavantan evidentajn saĝaĵojn, sed kiam ni ĝin malfermas, devas rigardi ĝin kun indiferento, kvazaŭ antikvan turkan impostliston. Ĉio ĉi okazas pro tiu simpla kialo, ke ni ne komprenas lingvon."

Tion skribis hungara verkisto Dezső Kosztolányi en la komenco de nia jarcento. Liaj pensoj koncernas ankaŭ niajn tagojn, hodiaŭ ili tiel same esprimas la vivantan realon. Eĉ, la pravo de iliaj ideoj nun iĝas pli kaj pli aktuala. Tio devigas multajn homojn por lerni unu aŭ du fremdajn lingvojn, por posedi kaj utiligi ilin laŭ kapabloj.

Estas nature, ke inter tiaj cirkonstancoj akompanas pliigita atento problemojn de la instruado de fremdaj lingvoj. Tiu ĉi atento povas malkovri mankojn kaj sukcesojn, sed — en la interesoj de plibonigo — ĝi estas antaŭ ĉio senpacienca. Kun kelkaj problemoj de la temo ni eniris kabineton de d-ro Károly Polinszky, ministro pri edukado de Hungario, kiu krom havi tiun grandresponsan postenon estas ankaŭ universitata profesoro, membro de la Hungara Akademio de Sciencoj, ano aŭ funkciulo de aliaj sciencaj asocioj kaj tiu de diversaj sciencaj komitatoj. Li konas do bone problemojn de la edukado kaj multon li faras por ilia solvo.

Pri la gazetaraj kaj fakaj diskutoj

— Lastatempe oni povis legi multe da diskutoj en la gazetaro pri la fremdlingva edukado. Nun nin interesas Via persona opinio pri kelkaj malfacilaĵoj de koncernaj taskoj.

— Mi komencus de tio, ke la polemiko pri la fremdlingva edukado ekflagras de tempo al tempo. Mi tuj aldonas: rajte. La interesado indikas, ke *ankaŭ en tiu ĉi kampo ni havas multe da farendaĵoj.* La polemikado inter la fakuloj daŭras senĉese, kaj dank' al tio — eĉ se iom malfacile — ni jam pasis antaŭen. Estas konate, ke en la lastaj kvar klasoj de la okjaraj bazaj lernejoj *preskaŭ duonmiliono da infanoj kaj en la kvarjaraj mezaj lernejoj pli ol ducentmilo da gejunuloj lernas la ruslan lingvon.* Nun mi ne volas paroli pri la lernantoj de la specialaj lingvaj klasoj de kvarjaraj gimnazioj, pri la studentoj de universitatoj kaj altlernejoj, ja krome ankaŭ en la kadroj de la Sciencpopulariga Asocio (TIT) kaj ankaŭ en aliaj formoj iras diversgrada edukado pri fremdaj lingvoj. Tiu ĉi diverĝa edukado tuŝas vastajn popoltavolojn, kaj mi aldonas: estus bone, se ĝi tuŝus pli multon da ili. *Sed la rezultoj tute ne estas proporciaj al la materiaj kaj spiritaj investoj.*

— Antaŭ kelkaj jaroj en Hungario aperis libreto de 17-lingva interpretistino kaj tradukistino sub la titolo: „Tiel mi lernas fremdajn lingvojn". La aŭtorino, Kató Lomb skribas en sia sukcesa verko: „El 113 lernantoj, bone sciantaj deklinacii kaj konjugacii ruse, post la 4—7-jara lernado de la rusa lingvo nur kvaropo scipovis senerare peti glason da akvo ruse."

— La realo, bedaŭre, iom similas tion. Studo, verkita en 1970 de fakuloj, okupiĝintaj pri la edukado de fremdaj lingvoj, en tio vidis unu el la kialoj de la malfacilaĵoj, ke „... la instituciita edukado ne kapablas garantii akiron de la grado de meminduka lingvoscio kaj ne povas doni al la instruitoj almenaŭ sufiĉe de energio, por ke ilia inklino pri la lernado transvivu la ĉeson de la lerneja devigo kaj tiun de la instruita kontrolo."

Kia estas la lerneja edukado pri fremdaj lingvoj, tion mi pene povus nun mallonge priskribi. Oni pensu nur pri unu el la diskutitaj temoj: la tasko de la lerneja instruado devas esti ĉu la pasiva aŭ la aktiva lingvoscio? Ambaŭ starpunktoj havas ja adeptojn. Sed mi povus vicigi la similajn demandojn.

Kontraŭdiroj de la edukado kaj la novaj edukplanoj

— Nia celo vere ne povas esti konigo de la fakaj polemikoj. Sed nin interesas alia afe-

ro: kiel Vi opinias pri la fremdlingva edukado en niaj lernejoj?

— Instruo kaj posedo de la fremdaj lingvoj estas unu el la gravaj problemoj de nia eduksistemo. Ni instruas fremdajn lingvojn, sed ne efike. *Dum la multjara lerneja edukado la instruitoj ekkonas en iom tro malalta nivelo la oficiale devigan rusan lingvon kaj iun alian lingvon elekteblan laŭvole.* Nature, ke paralele kun tiu ĉi ĝenerala bildo, oni — feliĉe — povas trovi sufiĉe da kontraŭaj ekzemploj. Rekonante la sendubajn sukcesojn, la nivelon de nia fremdlingva edukado ni opinias tamen malalta. Laŭ la konkludoj, devenantaj el la sukcesoj kaj mankoj, kelkaj konstatoj estas speciale konsiderindaj. Pruviĝis, ekzemple, ke en klasoj de la specialaj t. n. „lingvaj sekcioj", kie la jara kvanto de instruhoroj pri fremdaj lingvoj estas pli granda ol en la aliaj lernejaj klasoj, la grado de efiko de la fremdlingva edukado estas pli alta. Iras jam la eksperimentoj kaj la esploroj, ke helpe de pli bona elekto de la aĝo de edukitoj ĉu estus akirebla pli efika fremdlingva instruado.

— Kiel la lernejoj utiligos la spertojn, akiritajn pere de esploroj pri la fremdlingva edukado?

— Konate, ke ni establos novajn edukplanojn por la okjaraj bazaj kaj la kvarjaraj mezaj lernejoj. Tiuj planoj koncernos ankaŭ la lingvan edukadon. Projektojn de la novaj edukplanoj ni pridiskutis kun pedagogoj kaj aliaj fakuloj. Iliaj valoraj alparoloj, kritikaj rimarkoj, kiujn ankaŭ ĉi-okaze mi dankas al ili, multe helpis nin en la laboro. Laŭ iliaj rimarkoj kaj laŭ la rezultoj de niaj diskutoj kun ili la edukplanoj estis tralaboritaj kaj en tiu ĉi formo ni proponos ilin al definitivigo. Espereble, en la sekvaj jaroj ni povos instrui laŭ edukplanoj, kiuj solvos problemojn de la moderna fremdlingva edukado. La realigo de edukplanoj multgrade dependas de lernolibroj kaj ĉefe de pedagogoj. Tial ili devas ĝustatempe prepari sin al akcepto kaj al praktika realigo de novaj edukplanoj.

Ekde kritiko ĝis la hodiaŭaj postuloj

— Oni multe kritikas la lernolibrojn pri fremdaj lingvoj. Kiel Vi opinias pri tio?

— Mi pensas, ke ne estas tro erara la konstato: kiu nun lernas lingvon, volas unuavice paroli en ĝi. Laŭ tiu ĉi rajta postulo la moderna fremdlingva edukado rompas la malnovan tradicion kaj *konsideras sia plej grava tasko instrui la paroladon.* La pli malnovaj kaj ankaŭ iom tro granda parto de nun uzataj lernolibroj pri fremdaj lingvoj enhavas tiajn legaĵojn, esprimojn, kaj temaron, kiuj eble neniam aŭ nur malofte okazas en la vivanta lingvo, en la ĉiutaga interparolado de homoj. Eble mi ne devas citi ekzemplojn, ĉar la pli reprezenta parto de ili jam estis fruktuzita de humuristoj. La vero estas, ke la aŭtoroj dediĉis la tekstojn al legado, kaj ilia ĉefa celo estis pliigi la vorttrezoron de instruitoj. Alia demando estas, ke parto de la vortaro, lernita tiuvoje, kaj la vorttrezoro necesa al la ĉiutaga vivo ne koincidas. Pro tio multe estas la perditaj tempo kaj energio, malpli multas spertoj de sukceso ĉe la lernantoj, ktp.

— En la modernaj lernolibroj pri fremdaj lingvoj *oni devas doni ĉefan rolon al la homo kaj al la sfero, kie li vivas, laboras, kreas.* En la legaĵoj devas esti tiaj dialogoj kaj monologoj, kiaj povas okazi kaj eĉ okazas ĉiutage. Bone povas kompletigi tion aŭskultado de la radio kaj legado de gazetoj. Ilia brila avantaĝo estas, ke pere de ili oni povas alproprigi vortojn de la ĉiutage uzata, vivanta lingvo. Mi esperas, ke el miaj vortoj videblas: mi konsentas kun la kritikantoj, sed mi ankaŭ devas diri: laŭ la reala esploro *oni povus simile kritiki kelkajn eksterlandajn, sed laŭmodajn lernolibrojn pri fremdaj lingvoj.* Ankaŭ ni havas jam kelkajn bonajn lernolibrojn, kaj espereble, ni havos pli multe da ili, por la novaj edukplanoj. Komenciĝis do iuspeca progreso, kiun oni devas nutri kaj plifortigi.

La granda eblo apenaŭ utiligita

— Kiajn problemojn Vi vidas en la fremdlingva edukado en universitatoj kaj alternejoj?

— La plej grava problemo laŭ mia opinio estas, ke oni ankaŭ en la altgradaj edukejoj volas lerni kaj lernigi la instrumaterion laŭ metodoj de la mezgradaj lernejoj. Estas reala malfacilaĵo, ke precipe studentoj, lernantaj la anglan kaj francan lingvojn, trovas relative malmulte da eblaĵoj por paroli kun personoj al kiuj tiuj lingvoj estas gepatraj idiomoj, aŭskulti lekcionojn de tiaj lektoroj kaj partopreni fakajn kunvenojn. *Niaj universitatoj kaj altlernejoj jam sisteme interŝanĝas studentojn kun samfakaj edukejoj, funkciantaj en parolsferoj de la rusa kaj germana lingvoj.* Mi opinias, ke plinombrigo de la fremdlingvaj kluboj, sistema aranĝado de vesperoj kun kultura programo, invitado de eksterlandaj scienculoj, artistoj kaj publicistoj, gastantaj en nia lando (kaj oni povus daŭrigi plu) supozeble pliigos la efikon de nia fremdlingva edukado. Kompreneble, al tio necesus iom pli da invento kaj rekono de la eblaĵoj.

— Fine, permesu al mi demandi Vin pri la lingvo Esperanto kaj ĝia movado.

— Mi komencus de tio, ke *ekde mia junaĝo mi estas sincera simpatianto de la Esperanto-movado kaj kun intereso atentas ĝian evoluon.* Mi vidas grandegan eblon en la internacia lingvo, sed tuj aldonus: *nur ona parto de tiu eblo estas utiligita.* Ĉar tiu ĉi lingvo estas pli rapide posedebla ol ajna alia idiomo kaj tial, ĉar ĝi estiĝis kiel sintezo de vivantaj naciaj idiomoj, iĝis tiu vivanta internacia lingvo, kiu povus esti *la plej demokratia ilo de internacia komunikado.* Malgraŭ ĉio ĉi, ĝi ankoraŭ ne disvastiĝis en la mondo tiugrade, kiel tio estus dezirinda. Kial? Evidente, ke pro tio multaj el ni kulpas kaj nun mi parolas nur pri ni, laboruloj de la edukado. Sendube, ke la sistema instruado de Esperanto en lernejoj multe helpus en ĝia disvastigo. Sed tio eblas nun ankoraŭ nur kiel instruado de laŭvole elektita lingvo. Tial *entuziasmaj esperantistaj instruistoj de multaj niaj lernejoj kolektas ĉirkaŭ si la interesiĝantajn geknabojn aŭ gejunulojn, kaj konigas al ili la Internacian Lingvon. Ili meritas ricevi maksimuman helpon al la instruado de Esperanto laŭ la ekzistantaj ebloj.* Mi ne opinias reala enkonduki la oficiale devigan instruadon de la Internacia Lingvo en lernejoj por la proksima estonto...

Pri la propono subskribita de 140 parlamentanoj

— Pri tiu ĉi demando la hungaraj kaj eksterlandaj gvidantoj de la Esperanto-movado same opinias reale. Ili ja bone scias, ke neniu lando povas sola, izolita entrepreni establon de oficiale deviga instruado pri la Internacia Lingvo en lernejoj. Ankaŭ ili pensas tion reali-

gebla pere de multflanka internacia kontrakto de aliaj ŝtatoj kaj registaroj.

— *Jes, tio estas la sola racia vojo al tio, ke tiu ĉi grandsignifa afero iam atingu sian celon.* Sed ne eblas diri, kiam tio okazos. Al tio necesus plua plifortigo de la Esperanto-movado kaj multaj ŝtataj kaj interŝtataj fortostreĉoj kun diverskarakteraj preparaj pašoj.

— *Ĉi-rilate oni povus paroli pri disvolviĝanta procezo. Pri ĝioj diversaj en- kaj eksterlandaj iniciatoj nia ĵurnalo „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo) sisteme informas sian legantaron. Tiel maturiĝis ankaŭ grava hungara evento en tiu ĉi kampo: 140 hungaraj parlamentanoj subskribis proponon al la kultura komisiono de la Parlamento de la Hungara Popolrespubliko pri tio, ke ĝi organizu en siaj kadroj provizoran subkomisionon, al kiu estus aligitaj deputitoj de la Parlamento kaj lingvistoj. Tiu ĉi subkomisiono devus esplori lingvajn problemojn de la internaciaj rilatoj. Laŭ la faktoj, eduksistemo de neniu lando kapablas ja konvene solvi la vaste konatajn lingvajn problemojn de nia mondo tiel, ke tio kontentigu grandan parton de la popoloj. (Pri la propono HV informis en sia numero 1976/6.) Ĝuste tial la parlamentanoj proponas, ke la organizenda provizora subkomisiono de la kultura komisiono faru science fundamentitan raporton pri la tuta problemo. Tiun ĉi raporton esploru la hungara registaro por konsideri la farendaĵojn. Tiel ankaŭ nia registaro povus kontribui, ke tiu ĉi grandsignifa afero atingu la internaciajn forumojn, ĉar ĝi povas solviĝi nur en la internacia sfero. Vi, kiel ministro pri la edukado, ĉu subtenas la organizadon de tiu provizora subkomisiono? Kaj ĉu vi subtenas, ke ĝian raporton iam esploru la registaro kaj eble oni utiligu ĝin?*

— En mia propra nomo kaj en la nomo de la Ministerio *mi subtenas la organizadon de la subkomisiono.* Mi opinias, ke se laŭ ĝiaj esploroj estus farita detala raporto pri lingvaj problemoj de la internaciaj rilatoj kaj pri realaj perspektivoj de la Internacia Lingvo, *tio donus pluan helpon ankaŭ al nia Ministerio por vidi niajn eblojn kaj ellabori la farendaĵojn koncernantajn Esperanton.* Kaj se tiu ĉi raporto enhavos tiajn argumentojn kaj faktojn laŭ kiuj ĝi devus esti diskutita inter diversaj registaroj, tiam ankaŭ tion mi subtenus. Aldonante, ke ankaŭ la registaro de nia lando partoprenu en la ebla maturigo de la afero en la internacia sfero. Sed ankaŭ ĝis afero de Esperanto iĝos punkto de tagordo de la plej altaj ŝtataj kaj interŝtataj institucioj, *oni povas kaj devas fari multon en la interesoj de la Internacia Lingvo.*

Propono kaj subteno

— *Vi pravas. Ĉi-rilate estus utila ankaŭ Via ministra propono kaj morala subteno.*

— Mi pensas pri tio: ju pli multe da pedagogoj interesiĝus pri Esperanto kaj ju pli el ili ellernus tiun ĉi lingvon laŭvole, des pli *estus eble plivastigi la laŭvolan edukadon de la Internacia Lingvo.* Tiu estus tiel ankaŭ tial, ĉar laŭ miaj konoj la pli rapida posedo de la relative facila Esperanto povas ankaŭ plifaciligi la lernadon de la pli malfacilaj fremdaj lingvoj.

— Rilate la internacian kunlaboron mi pensas ankaŭ pri kio parolis Sándor *Gáspár,* en intervjuo por viaj revuoj:

— *Mi opinias preskaŭ certa, ke tia propono, ke la sindikatoj helpu la lernon de Esperanto, tiucele interkonsentante kaj rekomendante ĝin, trovus aprobon ĉe la sindikataj anoj kaj movadoj de multaj landoj, kaj ankaŭ ĉe la internaciaj korporacioj de sindikatoj«* (HV 1974/5).

Tio estas imagebla ankaŭ rilate la *internaciajn sciencajn institucionjn kaj studentajn asociojn.* Konate estas ekzemple, ke niaj universitatoj havas kontraktojn kun diversaj eksterlandaj universitatoj. Laŭ tiuj ĉi kontraktoj profesoroj, studentoj reciproke vizitas unu la alian, kaj ili organizas komunajn konsiladojn kaj konferencojn. *Estas imageble, ke tiuj kontraktoj proponus Esperanton kiel komunan lingvon de la aranĝajoj.* La ellernon de Esperanto indigus ankaŭ tio, ke tiu ĉi lingvo por la studentoj, kiuj finis la studadon, *ebligus en la posta tempo flegi la amikecon kaj la profesiajn rilatojn kun kolegoj, parolantaj aliajn lingvojn.*

Ĉion ĉi mi diris nur kiel ekzemplon, ĉar povas okazi ankaŭ aliaj ebloj. Tial mi proponas al la Hungara Esperanto—Asocio sumigi la proponojn, kiuj povas interesi nian Ministerion, kaj por kiuj ni povus fari ion, kaj poste ni havos la eblon pridiskuti ilin. En kio ni povos, ni donos la necesan helpon. Mi deziras pli multe da sukcesoj al la popularigantoj de Esperanto.

— *Mi dankas vin pro la intervjuo.*

Tamás *Klement*

Tr.: P. A. *Rados*

★ ĈAPITROJ

Zoltán Halász

I. ANTIKVA HISTORIO, PATRUJOKUPO

Pri la prehistorio de hungaroj ne restis skribaj dokumentoj. Ĝiaj fontoj do estas tiaj sciencoj, kiel lingvistiko, arkeologio, etnografio kaj antropologio. Pleje gravas el ili la kompara lingvistiko, kiu konstatas, ke la hungara lingvo — laŭ la vortprovizo kaj la specifoj de sia aglutina (»alglua«) strukturo — apartenas al la finno-ugra grupo de la Uralaj lingvoj[1], pli precize, al ilia ugra branĉo[2]. Ne estas decidite, ĉu la Uralaj popoloj devenis de Eŭropo, aŭ de Azio. Tamen laŭ la ĝenerala opinio la komuna patrujo de la apud-Obaj ugroj[3] kaj la prahungaroj troviĝis laŭ la meza fluo de l'rivero Volgo.

En la mezo de la unua jarmilo de nia erao, prauloj de la hungaroj lasis tiun teritorion, kie ili vivis kune kun la aliaj ugraj popoloj, kaj ekmigris suden. Tie ili kontaktiĝis kun prabulgaraj kaj praturkaj popoloj, sub kies influo ili fariĝis ĉevalhava bestbredanta nomada gento, vivanta jam en triba socio. Dum la migrado prahungaroj estis sub la regado de diversaj popoloj, kies imperioj rapide aperis kaj same rapide malaperis en la regiono de la Orient-Eŭropaj stepoj.

En la 5-a jarcento ili eniris la triban federacion de la bulgara-turka-devenaj onoguroj, kaj vivis kune kun tiu popolo ĉe la norda bordo de Nigra Maro. Poste parto de la onoguroj, direktiĝis suden kaj fondis la bulgaran ŝtaton, ĉe la suba fluo de Danubo. Grupo de la onoguroj restantaj disvastigis sian potencon ĝis Volgo; la aliaj formis triban federacion. La sep hungaraj triboj laŭnome Nyék, Megyer, Kürtgyarmat, Tarján, Jenő, Kér, Keszi — interligiĝis en alianco, kaj ili ekuzis kiel komunan nomon tiun de la gvida Megyer-tribo. Verŝajne, de tiu popolnomo »magyar« (hungaro) devenas Magyarország (Hungario) en la hungara lingvo. Dume la esprimoj, kiujn uzas la diversaj lingvoj por nomi la hungarojn (hongrois, hungarian, Ungar, vengr ktp.) certe devenas de la vorto »*onogur*«.

La indikoj de diversaj kronikoj rilate la postajn migradojn de hungaroj estas kontraŭdiraj. Tamen preskaŭ estas certe, ke en la jaro 889-a de nia erao ili retiriĝis en la teritorion inter la riveroj Dono kaj Dnep-

EL LA HISTORIO DE LA HUNGARA POPOLO ★



Mapo pri la popolmigradoj

1-2 Hungaroj
3 Avaroj,
4 Bulgaroj,
5 Kazaroj,
6 Slavoj,
7 Normandoj,
8 Longobardoj,
9 Araboj.

ro, pro la konstantaj atakoj de *peĉenegoj*[4]. Poste, puŝitaj de pereiga atako de tiu gento, en la jaroj 895—896 penetris en la basenon de Karpatoj, kiun ili jam konis, ĉar antaŭe dum siaj rabad-kampanjoj ili ĝin jam trairis.

Kiam la hungaroj okupis sian postan patrujon, en tiu teritorio loĝis slavaj popoloj. La hungaroj ne trovis ĉi tie konsiderindan reziston, ĉar la regno de la tie loĝantaj popoloj troviĝis en stato de disiĝo. La hungaroj tiel rapide fariĝis posedantoj de la lando. Ĉe la prahungaroj ekzistis du suverenoj, kiel kutimas ĉe la nomadaj popoloj. Laŭ tio la plej supra potenco — forme — troviĝis en manoj de »kende«; la alia suvereno estis la armeestro, *»gyula«*. La efektivan povon havis la tiutempa »gyula«: *Árpád*, kies idoj fariĝis poste la unua dinastio de Hungario.

Post la t. n. „patrujokupo" komenciĝis la rabad-kampanjoj. En la unua duono de la 10-a jarcento, la hungaraj rajdantaj sagpafistoj timigis preskaŭ la tutan Eŭropon, ĝis la okcidentanoj ellaboris efikan batalrimedon kontraŭ ili. La kirasita peza kavalerio de la Germana Imperio, reganta de imperiestro Otto la I-a, en la jaro 955 haltigis la hungarajn taĉmentojn ĉe *Augsburg*, kaj pli poste frakasis ilin en la decida batalo apud *Lech*. Kvankam post tio la hungaroj ankoraŭ faris kelkajn rabad-kampanjojn kontraŭ la Orientromia Imperio, tamen klare evidentiĝis, ke la hungara popolo alvenis la ŝanĝan punkton de sia historio. Ĝi devis ĉesigi la nomadan vivon kaj la aventuremajn kampanjojn, por fondi ŝtaton kaj aliĝi la Eŭropajn popolojn; se ne estŭs farintaj tion, la hungaroj estus kondamnintaj sin al la sama sorto kiu atingis la nomadajn popolojn: *hunojn* kaj *avarojn* ktp., kies spurojn plene forigis la historio.

Tr.: *VHZS*

Notoj:

1. *Uralaj lingvoj:* komuna nomo de la finno-ugraj kaj samojedaj lingvoj.
2. *Ugra branĉo:* la ugraj popoloj, kies lingvoj estas la ugraj lingvoj, kunvivadis de la disiĝo de la finno-ugra prapopolo (3-a jarmilo antaŭ nia erao ĝis la mezo de la 1-a jarmilo antaŭ nia erao. Ugraj popoloj: hungara, manŝia, ĥantia.
3. *Apud-Obaj ugroj:* la manŝioj kaj ĥantioj, vivantaj apud rivero Obo (Siberio).
4. *Peĉenegoj:* malaperinta nomada popolo. Parto enmiksiĝis poste en la hungararon *(be senyő-popolo).*

Antaŭ konkero de la patrolando, hungara trupo persekutas la bulgaran caron Simeonon (895). Miniaturo en Bizanca manuskripto (13-a jc.)

LAJOS KOSSUTH

1802–1894



Kossuth, varbante rekrutojn por la popolarmeo en Szeged

„Ĉio, forte karakterizinta la gloran jaron 1793, estas same trovebla en la de Kossuth organizita, militizita kaj entuziasmigita Hungarlando: leviĝo de la popolamasoj, nacia armil-produktado, asignoj, rapida juĝado super la revolucion bremsantoj, permanenteco de la revolucio..." — skribis Fr. *Engels* en 1849, kulmine de la revolucia milito kontraŭ-Habsburga, kiam la ceteraj revolucioj de Eŭropo jam estingiĝis venkite. Inter la epokoj feŭdisma kaj burĝa, la historia sangaspergita etapturna batalo daŭris ankoraŭ nur en Hungario: „Silentas Eŭropo, ree silentas" ĝemis dolore *Petőfi* samtempe.

La industria revolucio en Anglio, la granda burĝa revolucio en Francio pioniris por la kontinentaj landoj, kiuj dum la unuaj jardekoj de la 19-a jarcento unu post la alia progresigis la novajn ekonomiajn kaj sociajn fortojn: la burĝaron kaj la proletaron, la tendencojn al la moderna kapitalismo. La Habsburga imperio lasis nur etan aŭtonomion al sia kolonio, Hungario, kiu stagnadis krome ankaŭ pro sia feŭdisma ekonomio. La forte postrestintaj feŭdaj grandbienoj, la preskaŭ senindustria agrikulturo pli kaj pli postulis ne nur etajn reformojn, sed ŝanĝojn radikajn en la lando, por igi ĝin moderna, ĉesigi la feŭdan stagnadon, unuvorte: tute transformi Hungarion.

En tiun politikan batalon ĵetis sin plenenergie juna, grandtalenta advokato, Lajos Kossuth. Jam komence li vekis sensacion, iniciante novtipan, politikan ĵurnalon, kaj per brilstilaj precize argumentantaj artikoloj akiris rapide kreskantan legantaron. Lige kun liaj legantoj amasiĝis ankaŭ la liberala tendaro, sopiranta je ŝanĝiĝoj laŭ la vojo montrita de Kossuth. La Viena registaro provis haltigi lin, sendante lin en malliberejon, sed vane: la populareco de Kossuth kreskis eĉ pli. Premo de la feŭda hungara parlamento liberigis lin post tri jaroj: reprenante sian potencan plumon, ekagante denove sur la politikaj forumoj, Kossuth turnis la historion al nova epoko. La heziteme komencitaj apenaŭ-reformoj, sur kiujn Kossuth reflektis helan lumon de racia politikisto, montriĝis etaj paŝoj. Nobeloj kun etaj—mezaj bienoj kaj senhavaj intelektuloj — kia estis mem Kossuth — ekigis pli postuleman kaj radikalan politikon, luktis por gravaj sociaj kaj politikaj modernigoj, sen kiuj neniel eblus aliigi la mizerajn cirkonstancojn de la lando.

Estis Kossuth, kiu altiris la atenton al la nepra bezono *igi liberaj la kamparanojn*, plejparte servutulojn de la nobeloj. Li orientis prudente la progreseman nobelaron, ke en la malfacila politika batalo kontraŭ la reakciaj rondoj necesas sin apogi sur la ega forto de la kampularo. „Rajtojn por la popolo ... ĉar nur kune kun la popolo eblos venki la aristokratojn, repuŝi la reakciulojn", agitis la potencvoĉa redaktoro kaj admirita oratoro.

Malgraŭ ĉiaj ruzaj strebadoj de kanceliero *Metternich*, meze de la 40-aj jaroj Kossuth staris jam firme surfrunte de la opozicia liberala partio. Antaŭenigo de industrio, komerco, eĉ de navigacio (ĝis tiam tute neglektita afero), ĉesigo de la servuto, ĝenerala impostado kaj egalrajteco konsistigis la programon de la opozicio; tio necesigis ankaŭ plian aŭtonomion disde la subprema Aŭstrio.

Tiu politiko bazis sin sur komunaj interesoj de la etaj-mezaj bienuloj kaj de la kamparanoj. Kossuth mirinde kapablis esprimi ties interesojn kaj ideojn per magnet-efikaj frazoj kaj nerefutebla, klasikeca retoriko; al lia spirita potenco kontribuis rave sonora voĉo, vireske bela personeco — la lando, dumvoje por iĝi en moderna senco *nacio*, trovis en li la bezonatan, ne ŝanceligeblan kondukanton, sian heroon.

La lasta feŭda parlamento jam staris sub forta influo de Kossuth kaj lia partio. La registaro en Vieno kaj ties aristokrata, lojala sekvantaro estis devigitaj postiri lian lertegan politikan strategion, polemiki en defensivo. Kiam alvenis la kontinenton skuantaj revoluciaj tagoj *en marto de 1848*, Kossuth elpaŝis kiel vera revoluciulo: per plena efiko energie direktis la revoluciajn postulojn al la timiĝinta feŭda parlamento kaj al la Viena kortego, kun plena sukceso.



Ilustrita artikolo pri alveno de Kossuth kaj liaj sekvantoj al Anglio el la azilo en la Turka Imperio

Dum monato estis *likvidita* la tradicia feŭda sistemo, establiĝis *konstitucia reĝimo,* de popolo elektita parlamento kaj al tiu-ĉi respondeca Hungarlanda registaro. La popolo — precipe en Pest la 15-an de marto — amase levis la revolucian standardon, kaj faris nekontestebla la epokfaran venkon de Kossuth. La servuteco de la kamparanoj likvidiĝis; jam liberaj civitanoj, multaj el ili jam mastroj sur propra terpeco!

La historia rolo de Kossuth ankoraŭ ne finiĝis. La Habsburgoj venkis la revoluciojn en Vieno, Prago, Nord-Italio, kaj provis perfide repreni la hungaran aŭtonomion, antaŭe aprobitan, eĉ atakis Hungarion per armeo!

En tiu danĝerega periodo estis li, kiu firme direktis la nacion por defendi sin kaj siajn rajtojn. Li sukcese insistis la novelektitan parlamenton — per grandioza parolado — decidi pri *armita kontraŭstaro.* Por haste starigi la popolarmeon, Kossuth mem rondveturis varbi en la lando. Per flamigaj alvokoj, de vera patriotismo ardantaj alvokoj li entuziasmigis la popolon por armi sin, rekrutiĝi en la landdefendan, revolucian armeon. Antaŭ amaskunveno en Szeged li esprimis patose, tamen sincersente la plenan konfidon je la revolucio: „La popolon mi kredas tiom potenca, ke se ĝi levos sin en konkordo, kun fortikaj brakoj firme teni kapablos eĉ la volbojn rompiĝantajn de la ĉielo falanta."

La unua Habsburg-atako kvankam estis rapide rebatita, la danĝero tamen abundiĝis, kaj ekfuriozis la trudita milito. La animanto de la nacio baldaŭ devis organizi kaj direkti la novestablitan ŝtaton, ekipi kaj orienti la armeojn, kiel elektita prezidanto de la Landdefenda Komitato. Post duonjaro, je pinto de la milito, la parlamento *detronigis* la Habsburg-dinastion, kaj Lajos Kossuth estis unuanime elektita *reganto-prezidanto* de la sendependa Hungario (14. apr. 1849.). Surlipe kun nomo de Kossuth kolektiĝis novaj trupoj; la revolucio kunfandiĝis kun heroa lukto por la sendependeco, kontraŭ la Habsburga tiraneco. Gloraj venkoj en grandiozaj bataloj disfamigis en la mondo la bravan reziston de Hungario. Vieno petegis kaj ricevis helpon de la rusa caro — en spirito de la misfama Sankta Alianco. Kontraŭ tia plimulto la izolitaj hungaraj armeoj jam ne povis daŭre elteni, ĉefgeneralo Görgey devis kapitulaci. La svenintan landon reprenis de la venkinta cara armeo la fifama Habsburg-generalo *Haynau,* por terore subpremi ĉion revolucian... Fuĝis kiu povis.

Ankaŭ Kossuth formigris kaj trovis azilon en la najbara Turka Imperio. Baldaŭ la Usona registaro invitis la mondfaman heroon de la libereco, kaj ĝia militŝipo veturigis lin al Francio, Anglio, poste en Amerikon. Kien ajn vizitis Kossuth, per apenaŭ priskribebla entuziasmo akceptis lin homamasoj, urbestraroj kaj parlamentoj, omaĝe al la estro de la tiranismon kontraŭbatalinta Hungario. Dum longa vico de manifestadoj Kossuth akiris specifan gloron: liaj *anglalingvaj* paroladoj vekis miregon ĉe la publiko, kiun li tute ravis per majstraj oratorajoj, taksitaj kiel plej altaj plenumoj de la retoriko-arto.

La patrion perdinta kolosa revoluciulo dediĉis sian tutan vivon ankaŭ plue per impona energio por sia subpremita lando, por ties liberigo. Lia verva agado inter la revoluciaj medioj de Eŭropo, en la altaj sferoj de la internacia politiko kaj diplomatio havis multajn, ne malgrandajn sukcesojn; liaj vortoj kaj skribaĵoj vivigis, admonis kaj insistis patriotojn ne nur hungarajn. Kie necesis batali por nacia libereco — apud *Garibaldi* en Italio, en turkpremitaj Balkanaj landoj, kontraŭ la cara sceptro aŭ flanke de prezidanto *Lincoln* — kunbatalis liaj fidelaj sekvantoj.

La lastaj jardekoj de la maljuna Kossuth pasis en la nova, sendependa Italio, en Torino. Tie vivis kaj senlace daŭrigis sian agadon kaj verkadon la eks-regnestro de la libera Hungario, kiu neniam akceptis la historian kompromison kun Aŭstrio (1867), nek ties sekvon, la Danuban Monarkion, Aŭstrio-Hungarion. Nur lia korpo revenis post morto al Budapeŝto en la tombon; lia spirito post duonjarcento venis hejmen, kiam liaj ideoj definitive venkis: lia nacio iĝis finfine — post jarcenton daŭra barakto — mastro en sia lando.

Ervin *Fenyvesi*

La maljuna Kossuth en Torino (1889)

Lajos Kossuth

PAROLADO EN MANĈESTRO, 14 MAJO 1859

(Fragmentoj)

Se iu povas atesti pri liberec-amo de la angloj, mi povas; mi, viva atestanto de ilia grandanimeco; mi, kies ĉirkaŭŝtormita kapo kvietiĝis sur la protekta brusto de Anglio... Mi venis tien ĉi kiel senpatria ekzilitio, senbrile, escepte de kelka radieto de hellumo, trafinta mian personon, ĉar al mi eblis preni bravan parton el la liberigaj luktoj de mia patrio. Tiuj personoj, tiuj sociaj klasoj, kiuj nun volas impliki Anglion en militon por sia favorata Aŭstrio, turnis dorson al la mizera ekzilito, aŭskultis fide — orele la kalumniojn, ĵetitajn sur lin far la malico... sole tial, ĉar mi batalis por libereco kontraŭ Aŭstrio, ĉar mi kontribuis, ke la Aŭstria potenco rompiĝinta estis humiligita ĝis la polvo, de kie nur 200 000 bajonetoj rusaj kapablis levi ĝin...

Kiam antaŭ du jaroj makuloj de alianco kun Aŭstrio minacis la brilon de ŝildo de Anglio, mi estis vidinta en tiu ĉi sama ejo, en tiu glora halo de la komerca libereco, kvar mil anglajn virojn kvazaŭ unu homon — ekstari, kaj per tri kondamnaj murmuregoj protesti kontraŭ la alianco kun Aŭstrio. Iliaj protestegoj tondre skuis ĉi murojn, kaj sur flugiloj de la libera preso penetrintaj en internojn de la strato Downing, pelis for la danĝeron de tiu alianco. Tiu danĝero denove staras sur la sojlo, kaj se tiam nur kiel nacia honto, nun jam la sanga milito, kiel nacia malfeliĉego minacas Anglion.

Sed tio ne eblas, ĝi estas malebligenda! Levu sian potencan voĉon la popolo: diskriu tutlanden la vetoon malpermesan... Vi memorigu la regantojn, ke por Anglio, kaj ne por Aŭstrio ili fariĝis ministroj;... kaj klarigu al ili nete — decide, ke la angla popolo, frate simpatianta por la itala libereco kaj hungara sendependeco, se jam por la libereco ĝi ne eniĝos... eĉ malpli, neniel permesos disipi sangon kaj oron de Anglio favore al Aŭstrio, piedpremanto de la libereco!... (Ĉiuj ekstaras, per longa, laŭta entuziasmo esprimas plenan konsenton.)

Gloso: Napoleono la 3-a, en alianco kun la Piemonta Reĝlando kaj Kossuth, preparis militon kontrau la Habsburg-reĝimo en Nord-Italio helpe por unuiĝo de Italio. La esperojn de Kossuth por liberigi ankau Hungarion, Napoleono ne plenumis, ĉar li rapide packontraktis. Per la supra parolado L. K. defaligis la konservativan (tory) registaron. (Elparolu: lajoŝ koŝut.)

Trad. E. Fenyvesi

Solenado de Kossuth sur la Broadway en Novjorko la 6-an de decembro 1851. La slogano super la strato estas: Hungario ne estas perdita



Gordon McLennan, ĉefsekretario de la Brita Komunista Partio, unu el la vicprezidantoj de TUCEG

SINDIKATA KAJ KOOPERTIVA INICIATO

Ruĝa flago — kun kvinpinta verda stelo

Dum la pasinta jaro la unuan de majo en Londono ĉe la kutima demonstracio de la laboristoj oni disdonis 100 000 ekzemplerojn de flugfolio, kiun ornamis la ruĝa flago de la internacia laborista movado, kaj en ĝi la kvinpinta verda stelo de la Esperanto-movado. Ĝi estis alvoko de nove fondita poresperanta unuiĝo, nomata TUCEG (mallongigo de la angla nomo: *Trade Union and Co-op Esperanto Group* — Sindikata kaj Kooperativa Esperanto-Grupo).

TUCEG meritas la atenton de la internacia Esperanto-movado jam pro sia konsisto: ĝia prezidanto estas Stan *Newes*, brita parlamentano. La estraro estas eĉ pli parada: eniris ĝin interalie Jack *Jones*, ĉefsekretario de la sindikata unuiĝo, Michael *Mc Gahey*, prezidanto de la Skota Minista Sindikato, Tony *Benn*, ministro pri energio, elstaraj personecoj en Britujo. Estas ĝojinde, ke krom sindikataj gvidantoj, funkciuloj de la Laborista Partio kaj membroj de la brita registaro, partoprenas en la estraro ankaŭ Gordon *McLennan*, ĉefsekretario de la Brita Komunista Partio.

La alvoko de TUCEG emfazas la netaŭgecon de la angla (kaj „usona") lingvo por funkcii kiel internacia komunikilo en la tuta mondo, kaj konsideras grava tasko de la internacia laborista movado la akceladon de la enkonduko de Esperanto. Ĝi atentigas, ke akcepto de la angla kiel internacia lingvo, donus grandajn avantaĝojn al la angle parolantaj landoj, kaj nepre rezultus altrudon de la anglausona kulturo al la tuta mondo.

Prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio, Leon *Smith*, konigante la agadon de TUCEG dum la 62-a Universala Kongreso en Rejkjaviko, alvokis ĉiujn landajn asociojn por fortigi sian kunlaboradon kun la sindikatoj kaj kooperativoj. Kun ĝojo kaj certa kontenteco ni povas noti, ke HEA iasence pioniras sur tiu kampo, ja ekde la jaro 1961 ĝi laboras en tre forta ligo kun la hungara sindikata centro, kiu ankaŭ forte subvencias la landan Esperanto-movadon. Elpintiĝo de tiu kunlaboro estis la intervjuo kun Sándor *Gáspár* (aperinta en la n-ro 1974/5 de HV), ĉefsekretario de la Konsilantaro de Hungaraj Sindikatoj kaj membro de la Politika Buroo de la Hungara Socialisma Laborista Partio, en kiu li esprimis la pretecon de la hungara sindikata movado subteni la aferon de Esperanto en ĉiuj internaciaj sindikataj forumoj, kie tiu demando lanĉiĝas. Verŝajne ni ne eraras supozante, ke tiu deklaro ankaŭ kontribuus al la fontiĝo de TUCEG. Ni aldonu ankoraŭ, ke tiun intervjuon sekvis opiniesprimo de preskaŭ ĉiuj hungaraj sindikatoj sur la paĝoj de la hungarlingva revuo de HEA, kaj la afero tute ne restas en la sfero de belaj, konsentaj vortoj — la sindikataj organizaĵoj cie en la lando fariĝis vera viviga bazo por la disvastigo de Esperanto inter la laboristoj.

Estas necese, ke laŭeble plej multaj landaj asocioj faru sian eblon sur tiu tereno. La sindikata kaj kooperativa movado ludas potencan socian rolon en ĉiuj socialismaj ŝtatoj, kaj ankaŭ en la plimulto de la evoluintaj landoj. Gajni tiujn movadojn por la afero de la Internacia Lingvo signifas fari sepmejlan paŝon al la enkonduko de Esperanto.

Korespondadreso de TUCEG: TUCEG Convenor, Dave Wetzel 28 Penderel Road, Hunslow, Middx., Britujo.

„NI PRETAS POR AMIKA KUNLABORADO...”

Hungaraj sindikataj kaj kooperativaj funkciuloj pri la iniciato de TUCEG

En la hungarlingva revuo de HEA, *Világ és Nyelv* (Lingvo kaj Mondo), aperis ampleksa raporto pri la agado de TUCEG. Tiu numero de la revuo estis sendita al ĉiuj gravaj sindikataj kaj kooperativaj funkciuloj en Hungario. Ĉi tie ni aperigas — en iom koncizigita formo — kelkajn el la reagoj.

József Timmer, sekretario pri internaciaj aferoj de la Tutlanda Konsilantaro de Hungaraj Sindikatoj:

Leginte en via revuo la artikolon pri la fondiĝo de TUCEG, kaj ankaŭ la flugfolion pri ĝiaj celoj koncerne la Internacian Lingvon, mia unua penso estis, ke tio plene harmonias kun la intervjuo de kamarado Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la hungara sindikata centro, kiun li donis pri Esperanto al via revuo. Ĝoje mi informiĝis ankaŭ pri tio, ke en la TUCEG-unuiĝo partoprenas pluraj gvidantoj de 12 grandaj britaj sindikatoj, de la Brita Laborista Partio kaj Brita Komunista Partio, kaj aliĝis al ĝi tuta vico de aliaj organizajoj.

La laborista movado de nia lando apogas la Internacian Lingvon ekde la komencaj tempoj — en la spirito de tiu ĉi tradicio la hungara Esperanto-movado laboras ankaŭ nuntempe sub la aŭspicioj de la sindikatoj — do, mi salutas la fondiĝon de TUCEG kun sinceraj bondeziroj. Tiom pli, ĉar mi atribuas internacian signifon al la fakto, ke tiu ĉi organizajo, konsistanta el prestiĝaj, altrangaj funkciuloj, fondiĝis ĝuste en la lando de la plej disvastiĝinta tn. „mondlingvo”, en Britio...

Meritas rekonon la programo de TUCEG, apogita de elstaraj personecoj, celanta „akiri la subtenon de la laborista movado por Esperanto, por ke ĝi povu plenumi la rolon de dua lingvo en ĉiuj landoj”. Estas internacie atentinda ankaŭ la sekva eldiro de la flugfolio: „La laborista movado devas apogi aktive Esperanton, kiu prezentas la solan demokratian kaj praktikan solvon de la lingvo-problemoj de la mondo.”

Estus bone, se la britaj sindikataj funkciuloj, kiuj fondis la Sindikatan kaj Kooperativan Esperanto-Grupon, akcelus, ke en la duflankaj kaj plurflankaj traktadoj inter la diverstendencaj sindikataj centroj ni pritraktu ankaŭ la internacian utiligon de Esperanto en la sindikata movado, konforme al la spirito de la menciita intervjuo de kamarado Gáspár kaj de la flugfolio de TUCEG. La internacia sindikata movado povos popularigi kaj instruigi Esperanton inter la vastaj amasoj de la organizitaj laboristoj, se la diverstendencaj landaj sindikataj centroj estos venintaj al unueca interkonsento pri tio. Flanke de la hungaraj sindikatoj ni emfaze pledos por tia interkonsento.

Lajos Méhes, ĉefsekretario de la Sindikato de Laboristoj en la Fera kaj Metala Industrio, parlamentano, membro de la CK de la Hungara Socialisma Laborista Partio:

... Kiel ĉefsekretario de la sindikato de hungaraj ferlaboristoj, estas al mi agrable saluti la iniciaton de la britaj sindikataj funkciuloj kaj la celojn de TUCEG. Mi ĝojas, ke inter la vicprezidantoj de tiu unuiĝo troviĝas ankaŭ nia amiko kaj partnero Hugh *Scanlon*, prezidanto de la riĉtradicia brita ferlaborista sindikato. Se nun li, ke en nia lando funkcias pluraj esperantistaj grupoj en kulturdomoj de ferindustriaj fabrikoj, kaj tiuj grupoj uzas kaj flegas la Internacian Lingvon kun la subteno de la sindikataj komitatoj. Multaj grupanoj korespondas kun eksterlandanoj, interalie ankaŭ kun amikoj el la brita laboristaro aŭ intelektularo...

Pro la fakto, ke la fondiĝon de TUCEG iniciatis la brita sindikata movado, ni atendas ĝiajn elpaŝojn sur internacia tereno, ĉar ni pretas por sincera, amika kunlaborado kun la samfakaj sindikatoj ankaŭ koncerne tiun ĉi temon.

István Szabó, prezidanto de la Landa Konsilantaro de Agrikulturaj Kooperativoj, parlamentano, membro de la CK de la Hungara Socialisma Laborista Partio:

Multe min surprizis la raporto pri la fondiĝo kaj flugfolio de la brita TUCEG. Tiu grandsignifa unuiĝo denove pruvas por mi la vivoforton de la tutmonda esperantista movado, ĝian progresan, krean kaj organizan kapablon...

Mi salutas la fondiĝon de TUCEG! Tiom pli, ĉar la kamparanoj konsistigas tiun plej vastan popoltavolon en ĉiuj landoj, kiu havas la malplej favorajn cirkonstancojn por alproprigi fremdajn lingvojn ... Tial tre volonte ni kuniĝus kun la koperativaj gvidantoj de TUCEG kaj kun niaj alilandaj partneroj por meti tiun ĉi demandon en tagordon ĉe la Internacia Asocio de Kooperativoj, kiu estas la plej granda neregistara organizaĵo de la mondo ...

D-ro Frigyes Molnár, prezidanto de la Landa Unuiĝo de Kooperativoj, parlamentano, membro de la CK de la Internacia Asocio de Kooperativoj:

Ankaŭ la laboruloj de niaj kooperativoj ĉiam pli deziras koni la kooperativan movadon de aliaj landoj, la bonajn spertojn de ties evoluo, iliajn modernan teknologion kaj teknikon, kaj, kompreneble ankaŭ la kulturon kaj vivcirkonstancojn de aliaj popoloj ... La nunan tempon ni trovas aktuala por stimuli fondon de esperantistaj grupoj en niaj kooperativoj, kreante la subjektivajn kaj objektivajn antaŭkondiĉojn por la instruado de Esperanto.

Bone servus la realigon de tiuj ĉi celoj, se kreiĝus interkonsento pri kunlaborado inter la Landa Kooperativa Konsilantaro kaj Hungara Esperanto—Asocio. Dum la lasta kunsido de la Kooperativa Konsilantaro jam ni faris tiucelan iniciaton ...

(Laŭ la revuo *Világ és Nyelv*)

Attila József

PROFITBALADO

Ĉe la gasflamo knedu panon,
bruligu brikon el argil',
dum jupo flirtas, vendu amon,
manplaton vundu la fosil',
portistu liverante sakojn,
dorskuŝu ĉe la min-instal',
lernadu aŭ ne lernu fakojn —
profitas nur la kapital'.

Silklavi uzu la benzinon,
per via peno kresku ajl',
mekantan buĉu vi kaprinon,
vestfaru — estu bona tajl',
sed kio iĝos via sorto?
Maldung', kaj kia sekvu far'?
Ĉu ŝtel', almoz'? Vin punos Ordo -
profitas nur la kapital'.

Sopiru, verku belajn kantojn,
ŝinkpeklu laŭ la Prag-metod',
karbminu aŭ kolektu plantojn,
kalkulojn viajn gardu kod',
en metropol' aŭ en vilaĝo
vivadu — estas tutegal',
eĉ se vi vidas: jen pagaĵo —
profitas nur la kapital'.

Dediĉo

Proleto, tedus vin ĉi listo,
ja vin ne nutras kaviar',
ĝis dungas vin kapitalisto —
profitas nur la kapital'.

Tr.: Márton *Fejes*

Emeriko Szabó

RADNÓTI

Super suferoj vitre tintantaj
flugas la menso kantbirde:
La poeto kantas novajn epokojn,

lia kanto antaŭenflugas
kiel kolombo de Noa

ĝi revenas kaj portas
jam verdantan olivobranĉon

sed ĝi vane serĉas en bolanta maro de doloro

ĉirkaŭflugas la tendarojn
traserĉas la arbarojn
ŝtelaŭskultas la riverojn

La arboj krias: nur pafbruojn ni aŭdis
la riveroj diras: nur hufoferajn botojn ni vidis

serĉas plu la kolombo:
portas lumon en ombrojn,
fajron en fridajn fajrejojn, korojn

La ombroj diras: ni ne kaŝis lin
la fajroj diras: ni ne varmis lin

finfine la kolombo flugis al la homoj
demandis avojn ... infanojn prirabitajn

Homoj diris: jes—ne—ja—ktp
infanoj diris:

lia koro en niaj brustoj,
lia kanto en niaj buŝoj
kaj la kolombo tie finfine ripozis.

Miklós Radnóti — hungara poeto mortigita de la nazioj en 1944.

Poeto de sento profunda

Nikolao Ĥohlov mortis antaŭ 25 jaroj

Nikolao Ĥohlov ... Samaĝulo de Baghy kaj Kalocsay, li pli malfrue iĝis fama pro siaj verkoj kaj tro frue lasis la verdan Parnason. Tamen al lia poezia heredaĵo estas destinita longa kaj glora vivo, ĉar aŭtoro de *La tajdo* estas unu el la plej elstaraj esperantaj poetoj.

La nuna datreveno plian fojon memorigas, ke multaj cirkonstancoj de lia vivo estas ankoraŭ nesciataj de ni, liajn verkojn, dissemitajn en diversaj eldonaĵoj, ankoraŭ neniu kolektis plene, kaj tiu ĉi artikolo fakte estas la unua provo skizi lian biografion.

Nikolaj Ivanovič *Ĥohlov* naskiĝis la 31-an de januaro 1891 en Moskvo, kiel li skribis »je kvaronversto de la muroj de Kremlo«, kaj liaj infanaj jaroj pasis en ludoj inter ĝiaj muroj. En Moskvo li finis komercan lernejon kaj poste laboris kiel poŝtoficisto. Li esperantistiĝis en la jaro 1905, kaj en la gazeto *La Ondo de Esperanto* aperis liaj unuaj versaĵoj, ankoraŭ nematuraj. En 1918 li forlasis Moskvon, forveturante kune kun sia edzino en Poltavon. Tie, en Ukrainio, lin kaptis kaj mobilizis la blanka armeo. Lia edzino, kiel polino, sukcesis elmigri en 1919 al Varsovio, kie ŝi restis ĝis 1921.

Celante kiel eble plej rapide renkontiĝi kun ŝi, li ankaŭ forlasis la hejmlandon. En 1920 li estis jam en Jugoslavio, kaj en 1920 la edzino ankaŭ alveturis al li en Zagrebon. Tie al ili naskiĝis filo. Kaj denove nostalgio instigis lian edzinon entrepreni energiajn paŝojn por veturi al Pollando. Ne konante la cirkonstancojn, Ĥohlov plenumis ŝian deziron, kaj en 1923 ili estis en Varsovio. Sed nek laboron li povis trovi tie, nek permeson de la pola registaro resti en la lando pli ol unu jaron — templimo, ĝis kiu validis lia elmigrula pasporto, tiel nomata *pasporto de Nansen*. La edzino neniel volis lasi Pollandon, ŝia amo al la patrujo venkis, kaj ili devis eksedziĝi. Ĥohlov revenis al Zagrebo sola. Tiufoje la poeto restis en Jugoslavio ĝis la jaro 1928. Li kunlaboris en la gazeto ***Konkordo***, profunde studis poezian arton, kaj plimulto de liaj versaĵoj, kolektitaj en *La tajdo*, evidente estis verkitaj en Zagrebo. Li tre amis Kroatujon, ĝian inteligentan kaj laboreman popolon, parolis kroate tiel, ke oni ne povis rekoni en li alilandulon, li eĉ sciis dialektojn de tiu lingvo, studis kaj tradukis kroatajn kantojn. Tamen la sopiro al la patrolando ĉiam pli kaj pli obsedis lin.

Fine li ricevis permeson reveni, kaj en la jaro 1928 li forlasis Jugoslavion por ĉiam. En Moskvo li laboris kiel ekonomiisto en diversaj entreprenoj, denove edziĝis, kaj en la jaro 1931 naskiĝis lia dua filo — Leonido.

Ĥohlov aktive partoprenis la agadon de la Moskva esperantistaro, en la Sovetrespublikara Esperanta Unuiĝo (SEU) li estis gvidanto de literatura sekcio en la lingva komisiono, kaj samtempe sekretario de la komisiono mem. Li kunlaboris en la Tutunia Societo por Kulturaj Interligoj kun Aliaj Landoj (VOKS), tradukis, partoprenis kompiladon de rusa-Esperanta vortaro, kaj faris grandan porliteraturan organizan laboron. Tie ĉi, en Moskvo, estis verkita ankaŭ lia studo pri la Esperanta stilistiko, kies manuskripto evidente pereis dum la milito. Li entuziasme studis kaj propagandis marksismon-leninismon, kaj revis verki ion novan, pli maturan ol *La tajdo*, sed tiuj revoj bedaŭrinde ne efektiviĝis.

Dum la dua mondmilito Ĥohlov loĝis en Taŝkento, kie li donis ĉiujn siajn fortojn por la venko, organizante industriajn entreprenojn sur la nova loko kaj instruante homojn labori per moderna maŝinaro. Li revenas Moskvon en 1944 post grava malsano, same interesiĝas pri la Esperanta vivo, sed jam nenion verkas mem, nomante sin »estingiĝinta vulkano«. Ĥohlov mortis la 26-an de februaro 1953. en Moskvo pro apopleksio. Li ripozas en la *Ostankina* tombejo.

Nemultaj verkoj de Nikolao Ĥohlov estis eldonitaj. Krom kelkaj tradukoj (*Krucumo* de A. Drozdov, Zagreb, 1922; *Morto de Danton* de A. N. Tolstoj, Köln, 1928.; *Orientaj fabeloj* de Doroševič, Leipzig, 1928.; *Bela Joe* de M. Saunders, London, 1929., kune kun J. Blaikie; *Historio de la mondlingvo* de E. Drezen, Leipzig, 1931., kune kun Nekrasov) libroforme aperis nur *La morto de la delegito de UEA* (Zagrebo, 1924.), komedieto sufiĉe ŝablona kaj supraĵa, kaj lia ĉefverko — la poemaro *La tajdo* (Köln, 1928.). Nur kvardek versaĵoj estas en tiu libreto, sed preskaŭ ĉiu el ili estas vere majstra. La temaro de Ĥohlov estas tre vasta: apud belegaj amaj versaĵoj tie trovas lokon brilaj verkoj de politika liriko, kiel *1905**, enhavanta frostotremigan bildon de dispafado de la popola manifestacio en Moskvo, kiel *Eŭropo*, plena de vera humanismo, kiel *Mia patrujo*, en kiu la poeto, troviĝanta tiam en Polio, elverŝas profundan amon al la socialisma patrolando; kaj liaj ĉarmaj ŝercaj versaĵoj kaj filozofaj meditoj en *Prolegomeno* kaj *La tajdo* — ĉio ravas per freŝaj kaj emociaj bildoj, kvazaŭ superplenigantaj ĉiun verson per klara kaj simpla lingvo, per senriproĉa ritmo kaj muzikeco. Ne vane Ĥohlov metis al sia libro moton de P. *Verlaine*: *De la musique avant tout chose* ... — ĉiu lia verso havas kvazaŭ sian muzikan subteksto n, iun akompanantan melodion. Sed la ĉefa trajto de liaj versaĵoj estas bildeco: Ĥohlov majstras rezonadon per bildoj, ĉiam neatenditaj kaj ĉiam trafaj, tial liaj plej filozofiaj versaĵoj estas plenaj de belo kaj ĉarmo.

La koro de Ĥohlov ĉiam estis kun la patrolando; li havis nenion komunan kun la reakcia elmigrintaro, kiu ŝajnis al li »mezepoka«, kaj similanta personojn el la verko *Mortintaj animoj* de Gogol. Amo al virino kondukis lin for de la patrio, sed amo al la patrio lin revenigis. Kaj inter la popolo, konstruanta socialismon, li sciis trovi sian lokon.

B. Tornado

*Aperinta en la numero 1977/5 de HV.

Nikolao Ĥohlov

VIBURNO

Ĉe serpentuma rivera turno,
Ombrante ŝtonojn de moska put',
En la umbela ornam' viburno
Sunumas brančojn sur verda krut'.

Mi ne forgesis — mi ĝin rekonas,
La kamaradon de l' fora jun';
En la animo revide sonas
La pasinteco tra l' muta nun'.

Ĉu ne hieraŭ la varman manon
Glacsie brogis la akva skvam',
Kaj lipoj trinkis la mirčampanon
Sub la tintado de l' guta gam'?

Ĉu ne hieraŭ la koro saltis
Pro la senbrida plensanga puŝ',
Ĉu ne hieraŭ apenaŭ haltis
En kantebrio la arda buŝ'?

Kun la freŝeco de la hieraŭ
tre zorge gardis la frida kor'
Či tiun puton če la rivero
Kaj la viburnon en la memor',

Por če l' revido dolore sveni
En skua ondo de la pasint',
Kaj, sveniĝante, rezigne beni
La gutoplendojn de l' plaŭda tint'.

Moskvo, 26. 5. 1928.

Gyula Fabók: Pravoslava memoro

Nikolao Hohlov

VINTRA FABELO

Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila sonorad'
Ni veturas — aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad'

En sereno de l' ebeno malaperas la fadeno
De la glata vintra voj' ...
Mia Nita — am' subita, de la frost' ebriigita
Alpremiĝas en la ĝoj'.

En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo
De la sentoj en la kor',
Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide
Kun favoro de Amor'!

Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj
Por dancanta ciganin',
Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu
Per freneza takto nin!

Brila neĝo — vintra reĝo — ĉion tenas en ŝiego,
Gaje cirpas en la knar',
La survoja vento ĝoja en malklara gam' hoboja
Vokas, logas al kampar'.

Unu suno — unu juno ... la unua febra kuno
Kaj magia stelpoem' ...
Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita
Ĉion kronas per alprem'!

Nikolao Hohlov

EŬROPO

El nekonataj, ŝlimaj abismoj de l' animo
Mi aŭdas strangan bruon, en malgraŭvola timo,
Ĝin trapenetras krioj, kaŝitaj dum miljaroj,
Grincado de la dentoj, metalo de fanfaroj.

En ĝi stertoras veoj, lamentas ploristinoj,
Tamburas ŝmacajn hakojn falintaj gilotinoj,
Susuron flirtas flustre truita silk' standarda
Kaj ĉion fonas kraka, reeĥa boj' bombarda ...

Analojn, postlasitajn de gentoj kaj prauloj,
Mi sentas en angoro tra tempoj kaj nebuloj.
Antikvaj krimoj pete al mi etendas manojn
Kaj forgesitaj lingvoj malbenas la tiranojn,

Haladzon spiras bruta, mensoga kaj maldanka
La tuta historio de mia raso blanka,
Nur kelkaj epizodoj, nur kelkaj bravaj voĉoj
Surlumas tiun muĝon de l' murdaj sangdibocoj,

En ili ĝermas savo, en ili — la lumturoj,
Pro ili solaj palas vizio de l' teruroj,
Nur sur iliaj ŝultroj atlantaj de kelkopo
Sekure kuŝas sorto de l'krimulin' Eŭropo.

Nur pro ilia sango, oferoj kaj ĉagreno
Retrovos la honoron la pala Magdaleno,
Por naski novan idon, en la feliĉaj larmoj,
Mesion liberigan de la katenaj armoj ...

Aŭskultu do Azio, mamnutristino nia,
Afriko sfinkse muta, tribar' Oceania,
Ĝemela kontinento de l' ambaŭ Amerikoj,
Kunfratoj de l' estonto kaj dumaj malamikoj,

Aŭskultu kaj konfidu la jam proksiman horon,
En kiu nova sango trafluos mian koron;
Ankoraŭ kelkaj limoj, hezitoj kaj decidoj —
Kaj kun la mirtaj brancoj pilgrimos blankaj idoj,

Kuraci viajn vundojn kaj super la cikatroj
Trasenti la hontigan brutecon de la patroj,
Starigi novan mondon de l' paco kaj libero,
Proklami la Laboron reĝino de la tero ...

* * *

Tempestas la mistikaj abismoj de l' animo,
Sed jam vidiĝas lumo en nova malproksimo;
Obee donas vojon laciĝo kaj miopo
Al kredo je l' estonto de la patrin' — Eŭropo.

A. H. TAMMSAARE

1878—1940

A. H. *Tammsaare,* klasikulo de la estona literaturo, naskiĝis antaŭ 100 jaroj, la 30-an de januaro 1878. Li postlasis riĉan verkaron — ĉefe romanojn — kiu donas fidelan bildon pri la vivo en la estona kamparo per stilo sobra, senornama, sed ĉiam trafa kaj penetra. Fine de la jaro 1976 la estona ŝtata eldonejo *Eesti Raamat* eldonis en Esperanto unu el liaj plej alte taksataj romanoj *La mastro de Korboja.* Okaze de la centenario de la verkisto ni publikigas fragmenton el tiu ĉi romano, volante atentigi la esperantistaron pri tiu ĉi libro, kiu aĉeteblas tre malmultekoste ĉe ĉiuj esperantistaj libroservoj. (Ĉe la Libroservo de UEA por 4,50 ned. gld., ĉe la Libroservo de HEA por 15,— forintoj. Esperantistoj en aliaj socialismaj landoj same povas mendi ĝin ĉe sia Landa Asocio).

A. H. Tammsaare:

REVENO EL LA MALLIBEREJO

Fragmento el la romano „La mastro de Kõrboja"

Hieraŭ posttagmeze li liberiĝis, forveturis el la urbo kaj atingis nokte la hejmon, kie li grimpis en la subtegmenton de la tenejo por dormi, vekinte nek la patron nek la patrinon, malsata kaj en deprimita humoro. Sed hodiaŭ vekiĝinte li estas gaja, li eĉ ne scias, kial. Li aŭskultas la susuradon de la betolo kaj ĝojas, aŭskultas la kantadon de birdoj kaj ĝojas eĉ pli multe. Li povas aŭskulti, kvazaŭ li neniam bastonbatis ies kapon kaj kvazaŭ li eĉ ne estis en malliberejo.

Ankaŭ Nero akceptis lin nokte, kvazaŭ li neniun tuŝetis eĉ per la pinto de sia fingro, bojis kelkfoje kaj venis vinzante al li, stariĝis sur la malantaŭaj piedoj, svingis la voston, lekis liajn manojn. Verŝajne ĝi dormas nun antaŭ la pordego de la intertenejo kaj atendas, ĝis kiam li, Villu, venos malsupren. Nur la homoj, pri ili estas alia afero, ili kompreneble ne pardonos, ne forgesos baldaŭ, ke Villu levis la manon kontraŭ homo, kiu havis en la mano trancilon. La patrino diros eble nenion, sed ŝiaj okuloj sendube pleniĝos de larmoj, kiam ŝi vidos Villu. La sola, en kies okuloj li eble legos sinceran felicon, estos Evi kun sia filo, ĉar fakte Villu estis en malliberejo ja pro ŝi: pro la okuloj de Evi Villu estis en malliberejo. Evi estas la unua virino, pro kiu Villu devis esti en malliberejo, la aliaj kaŭzis nur aŭ bagatelajn kverelojn aŭ senbridan drinkadon. Villu eĉ mem ne scias, kial, sed, ĉiam, kiam li havis aferojn kun virinoj, li devis drinki kaj interbatiĝi, en aliaj okazoj li tre malofte malpacas kun aliaj homoj.

La pensojn de Villu interrompis ekknaro de la teneja pordo kaj la voĉo de la patrino, kiu diris:

„Nu, Nero, kio hodiaŭ okazis al vi, ke vi la tutan tempon kaŭras antaŭ la pordego de la intertenejo? Ĉu vi pli bonan lokon ne trovas?"

La vortoj de la patrino vekis en la koro de Villu delikatan senton kaj al ŝi mem kaj al la hundo. Li volis esti bona al ambaŭ. Li volis, ke la patrino povu akcepti sian filon sammaniere, kiel akceptis lin la haroza kvarpiedulo, kiu krom ĝojo sentis ŝajne nenion alian.

La patrino eniris la tenejon, faris tie ion: verŝajne ŝi detrančis en la barelo viandon, por friti ĝin por matenmanĝo. Elirinte el la tenejo kaj ŝlosinte la pordon ŝi denove parolis al la hundo, diris al ĝi, ke ĝi iru kun ŝi al la domo. Sed kiam ĝi ne obeis, vekiĝis en la koro de la patrino ia dubo, pro kio ŝi iris al la pordego de la intertenejo, tie iom meditis, poste malfermis ĝin, venis al la tenejo kaj demandis rigardante supren:

„Villu, ču ne vi estas en la subtegmento?"

„Mi," respondis Villu kiel pentanta kulpulo.

Nun knaretis la rungoj de la eskalo kaj kiam Villu eksidis en sia kuŝejo, li vidis, kiel la kapo de la patrino, kiu per la dekstra mano tenis la supron de la eskalfosto kaj en la maldekstra havis teleron kun lardopečetoj por la hodiaŭa granda festo, leviĝis super la randon de la subtegmento.

„Mi pensis kaj pensis, kial do la hundo sidas antaŭ la pordego de la intertenejo. Poste mi opiniis, ke eble estas vi, via puntempo estis ja en tiuj či tagoj finiĝonta, kaj jen, vere estas vi," diris la patrino kaj en ŝiaj okuloj kaj voče ne estis larmoj, nur ŝia parolmaniero estis strange mallaŭta, kiel kutime dum grava kaj paca dimanča mateno. „Kiam oni vin liberigis?" demandis fine la patrino.

„Hieraŭ, proksimume je la kvina," respondis Villu.

„Nur hieraŭ vespere mi kaj patro interparolis pri vi," notis la patrino.

„Kion patro diris?"

„Kion do li diru? Li diris, ke eble nun vi finfine fariĝos pli prudenta."

„Patrino, kredu min, mi jam delonge estas prudenta, sed tio ne helpas, kelkfoje tio neniom helpas."

„Vi estas tro obstina, pro tio. Vi volas esti super čiuj aliaj."

„Ho, mi ne estas obstina," respondis Villu senpacience. „Sed se oni estas viro, oni batu per pugno, oni ne venu kun trančilo, tio kolerigis min. Kiam mi pensas pri tio, kio okazis, kaj kiam mi pensas, se Otto el Künka vivus kaj če la balancilo denove atakus min per trančilo, kredu, patrino, mi povus denove per bastonego mortbati lin, porkaĉon, kaj mi denove irus en malliberejon, eč por pli longa tempo."

„Kial do vi tiel parolas, vi ja nur hieraŭ liberiĝis kaj hodiaŭ estas paca dimanča mateno," admonis la patrino. „Ne iru en ilian societon, ne iru al la vilaĝa balancilo, ili ne toleras vin, vi estas pli forta ol ili, vi plačas al la junulinoj pli ol ili. Evitu ilin, en mala okazo vi mem kaj ankaŭ aliaj fariĝos malfeličaj!"

En la lastaj vortoj sonis kvietaj peto kaj plendo.

„Kion faras Evi?" demandis Villu.

„Kion do ŝi faru, kion do ŝi entute povas fari?»' respondis la patrino, kaj nun ŝajnis al Villu, ke čirkaŭ la buŝo de la maljunulino aperis plorringo. „Evi estas nun priridata de čiuj, ŝi loĝas en la kabano de la patrino, kudras, ŝpinas, trikas, faras čion kio trafas sub la manojn por nutri kaj vesti sin kaj sian infanon. Jen, mi



donis al ŝi kelkajn vestojn, tiujn, kiuj restis post vi en la angulo de la kesto, kelkajn vindaĵojn kaj zonon, ilin akceptante ŝi, kompatindulino, ploris. Sed la knabo estas forta kaj sana, la patrino mem diras, ke li similas al la patro."

„Do el Korboja oni tamen forpelis ŝin?" demandis Villu.

„Oni ŝin ja precize ne forpelis, sed proksimume tia la afero tamen estis. La maljuna Rein mem, li ja multe ne parolas, sed tiu ača Madli, ŝi ne lasis ŝin, trankvila, ĝis la junulino plu ne eltenis kaj foriris. Ili ja estis čagrenitaj, ke vi kun la pafilo vagadis en ilia arbaro kaj poste oni trovis ankaŭ la brandfarejon. Vin persone ili ne povis atingi, pro tio ili čikanis la kompatindan junulinon. Kaj kion ŝi faru kaj kiel estu, tie ŝi ja ne havis propran anguleton kaj neniun, kiu ŝin apogus, ŝi estis puŝata kaj persekutata de čiuj, priridata kaj mokata de la junularo. Kaj plenfortan laboron oni de ŝi ja esperi ne povis. Kompreneble, če la patrino por ŝi estas pli bone. Tiu ja ankaŭ grumblas, sed propra patrino estas tamen propra patrino, ŝi grumblas kaj repaciĝas, insultas kaj amas. Ŝi ploras kaj estas malfeliča, ke ĝuste al ŝia filino okazis tiel."

„Kial do ŝi ploras, Evi ja ne restos tie eterne," diris Villu.

„Patrina afero! Ŝi ja ankaŭ zorgas pro sia infano. Vi ja estis en malliberejo."

Trad.: Benita *Kärt*

ZALA MEGYEI TEJIPARI VÁLLALAT

Laktajprodukta Entrepreno de Departemento Zala

8901 ZALAEGERSZEG, LENIN ÚT 6. PF. 5.

Telefon: 12-475 – Telex: 32-264

La fromaĝo de EMMENTAL
— konata eĉ ekster Eŭropo —
estas produktata en nia fabriko
laŭ originala, klasika teknologio

Liverado en blokoj, diskoj aŭ
dozigite, kiel la aĉetanto pretendas

ZALA

Tyburcjusz Tyblewski

SKIZO PRI ESPERANTA ROMANO

Iam, en eta rondo de amikoj aŭ kun kluba publiko, ni interparolis pri Esperanta literaturo, ĉiam post la fundamentaj konstatoj pri poezio kaj prozo, pri traduko kaj originalo ni devis konkludi, ke Esperanta prozo estas malpli riĉa ol la poezio.

Senevite sekvadis poste pluaj demandoj, inter kiuj nepre la plej senca: *kial?*

En aro de respondoj ne mankis ruzaj divenoj, profundaj analizoj, intuiciaj ĝeneraligoj, komparoj kaj statistikoj, dank' al kiuj ĉi tiu „kial" tamen plu restis kun plena insisto.

Ĉar nek malŝato de longaj priskriboj, nek komplikoj de la kreado, nek sumo de la presitaj paĝoj kaj ne la nombro de prozaj aŭtoroj kaŭzis nunan staton de prozo en nia literaturo. Do? ...

En ĉefaj verkoj de la monda literaturo geniuloj prezentis sortojn de individuoj aŭ grupoj, kunforminte bildon de la homaro. Tradukita el unu lingvo al la alia ies priskribo riĉigas ĝeneralan scion pri homa mistero, atingeblan de kleruloj. La faciliga rolo de Esperanto meritas agnoskon de la homaro, kiu tamen ĝis nun preferas atribui al la Internacia Lingvo ĉiajn difektojn de artefaritaĵo.

La homoj postulas de la Internacia Lingvo tion, kion ĝi povus enporti en la literaturon implice, kiel ian specifan kvaliton. Oni atendas de Esperanta verkado, ke ĝi prezentu iajn spertojn neakireblajn sen uzo de la Internacia Lingvo, karakterizajn por esperantismo.

Sufero, kaŭzita de ĝenerale konataj cirkonstancoj ne donas al ĝi la tuthomaran diametron. Amo enplektita en vortan konstruon de la Internacia Lingvo ne estiĝas pro tio ia supersento.

Oni ŝajne atendas, ke Esperanta literaturo respeguligu nekompareblajn, specifajn eventojn, sentojn, spertojn, neeblajn ekster esperantistaro.

Pli intiucie ol racie, tamen obstine oni atribuas al esperantismo la etikedon de kuriozaĵo, samtempe atendante de ĝi iajn superinteresajn valorojn ne tiom en la lingvo (ni ja vivas en la epoko de relativa lingva simpleco), kiom en la eventoj, travivoj, rimarkoj. Oni opinias, ke la plivastigo de la skalo samsignifas kun ĝia profundigo.

Efektive, *tian* verkon en Esperanto oni ne kreis ankoraŭ. Eĉ se ecoj de tiu ekbrilis en tiu aŭ alia lirikaĵo, mankas ĝis nun la proza prezento de ies sorto Esperantista.

Sed por verki tian prezentaĵon, oni devus antaŭe plene konscii, kio estas karakteriza implikaĵo de esperantismo. Ŝajnas, ke inter esperantistoj mem la konscio ne estas sufiĉe profunda aŭ ampleksa, kvankam ĉi-rilate pli gravas ĝuste la profundeco de meditoj kaj analizoj.

Dume ju pli multe da tempo pasas, des pli certa povas esti konvinko, ke individuaj sortoj de esperantistoj formas riĉegan krefonton pon la literaturo. Ĉar io karakteriza estas tio, ke la diversaj sortoj estas meditige similaj, fojfoje eĉ la samaj, kvankam inter ili troviĝas longaj distancoj.

Supozi, ke la simileco aŭ la sameco devenas de esperantistiĝo de la personoj, estas logika sekvo de nombraj faktoj. Esperantistoj protestas kaj kontraŭstras al tiaj „absurdaj" postuloj, ke ili prezentu per si eksterordinaraĵojn.

— Ja ni havas homan rajton vivi home. Niaj sentoj estas simplaj, ni ne pensas superhome!

— Se ne — demandas la postulantoj —, kial vi manifestas vian eksterordinaran povon tutmonde interkompreniĝi? Kaj pri kio? Pri *niaj* aferoj ni povas komuniki sen *via* lingvo.

Ĉi tiu kontraŭstarigo estas nur ŝajne absurda. Oni ne povas esti esperantisto sen influo de la psiko, ĉar la stato esti esperantisto preparas la homon al la stato formiĝi internaciisto. Kaj ĉu la lasta povas ne diferenciĝi de aliaj homoj, kies pensado kaj sentado havas siajn radikojn en regiono, dume la nia en la tuta mondo?

Evento post evento, sperto post sperto kaj jaro post jaro la internaciiĝado pli kaj pli profunde enestas nian psikon, komence kiel duboj, poste kiel ideoj kaj fine kiel sinteno, per kiuj ni manifestas nian aliecon — rimarkeblan kaj pritaksendan.

Ekzemple la *toleremo,* kiu signifas: „Ne kontraŭstari al io, kion oni ne aprobas aŭ kio malplačas, ĝenas aŭ suferigas, kvankam oni kapablus malhelpi ĝin". (PIV) La homo, en kies kondutoj esprimiĝas tia sinteno (la sinteno, sed ne la vortaj deklaroj) tuj atentigas ĉiujn aliajn, ĉar toleri la toleremajn estas la plej malfacila tasko por la plejparto de la homaro.

Ne nur atentigas. La sinteno de toleremo eĉ malamikigas aliulojn, kiuj kun impona akordo provas frakasi ĝin eĉ intrige, embuske, inside. Post la sukceso oni punas la toleremulon pro lia aŭdaco konduti spite al socia normo. En malsukceso oni komencas timi, estimi, sed ne rezignas pri la embuskado.

En apartaj sortoj de esperantistoj oni povas rimarki la neeviteblajn oferojn, kiujn ili donis el siaj karieroj pro la fakto de esperantistiĝo. Pro kio? Ĉu ne pro la rekonebla alieco en la sfero de ideologio, en la sintenoj, do en la kondutoj. Ian ajn aliecon plejparte punas ĉiu socia medio laŭ leĝoj konataj de la scienco.

Observi la aliecon de esperantisto, nomi ĝiajn elementojn laŭ kriterioj de psikologio kaj sociologio, prezenti ĝin en artista formo de literatura verko en la Lingvo Internacia — jen la tasko por nia prozo, jen la skizo por Esperanta romano, kiu devas ekesti.

Klasifiki kaj rekoni la ecojn de kabeismo (forlasi la Esperanto-movadon) — pri kiu ni havas lirikan ekvokon, sed kiu ĝis nun restas en sfero de divenado, kvazaŭ ĝi okazadus ie ekster nia socia movado. Jen alia tasko por verkistoj. Aperigi dramajn sortojn de individuoj, de la individuoj tiel karakterizaj, ĉu ĝi ne meritas la plej grandan literaturon de la mondo?

LIBROPRODUKTO KRESKAS

En la numero 1976/4 de HV aperis mallonga superrigado pri la Esperanta libroprodukto dum la jaro 1975. Depost tiam pasis du jaroj, kaj povas esti interese kompari la libroprodukton de la jaro 1975 kun tiu de 1977. Kompilante tiun ĉi statistiketon, mi bazis min sur la rubriko *Laste aperis ...* de *Esperanto*, konsiderante, ke alirebla por ĉiu esperantisto, do *vere aperinta* iu libro fariĝas nur post diskonigo en tiu rubriko. Parenteze vi trovos la respektivajn ciferojn el la jaro 1975.

Dum la jaro 1977 aperis 147 (90) verkoj pri aŭ en Esperanto, sur entute 16897 (8928) paĝoj. El tiu sumo nacilingvaj lerniloj de Esperanto aŭ nacilingvaj libroj pri Esperanto estis 36 (15) libroj, kun la amplekso de 4093 (1617) paĝoj. Pure Esperantlingvaj (foje-foje duone nacilingvaj) libroj estis do 111 (75), kun entute 12804 (7311) paĝoj. El tiuj estis beletraĵoj 49 (23) libroj. Originalaj beletraj verkoj el ili estas 12 (9), kun suma amplekso de 1936 (946) paĝoj. Duono de tiu dekduo — ses libroj — estas represaĵoj, do dum la jaro aperis *nur 6 nove kaj originale verkitaj libr(et)oj beletraj*, la sama nombro, kiel en 1975.

La nombro de la nefikciaj verkoj estas 62 (52), sur entute 6650 (5339) paĝoj. (Tiu cifero inkluzivas la 1340-paĝan represon de PIV.) Surprize granda estas la nombro de la originalaj nefikciaĵoj: 45 libroj sur entute 5167 paĝoj.

La meza amplekso de la Esperantlingvaj libroj altiĝis al 115 (99) paĝoj. Tamen, ankoraŭ svarmas broŝuroj: superas 100 paĝojn nur 45 (31) libroj. Aliflanke, la prezoj altiĝis pli ol estis atendeble: acetanto de ĉiuj libroj pri aŭ Esperanto devis elspezi 1365 guldenojn, do la meza prezo de 115-paĝa libro estis 9,30 guldenoj. Depost 1975 la meza amplekso de la Esperantaj libroj kreskis je 16%, dum ilia prezo je 56%. Ĉirkaŭ 20%-a jara inflacio.

La bildo ne povas esti plene kontentiga, precipe koncerne la nombron de la originalaj beletraj verkoj, tamen la evoluo estas fierinda. Espereble la kresko de la produkto ne haltos, kaj ĝi havos siajn konsekvencojn ankaŭ sur la kampo de la distribuado, kio siavice kondukos al signifa vastiĝo de la legantaro.

Fine ni menciu, ke la Libroservo de HEA dum la jaro 1977 disvendis Esperantajn librojn al hungaroj en valoro de ĉ. 240 000 forintoj. Tiu cifero nur parte inkluzivas prezon de lerniloj, ĉar tiujn oni acetas cefe en ŝtataj librovendejoj. Transkalkulado al guldenoj ne havus sencon, ĉar la ĝenerala preznivelo de libroj en Hungario estas relative malalta: pli ĝustan imagon pri la valoro de tiu sumo diras la fakto, ke ĝi estas 83-oblo de la meza monatsalajro.

V. B.

Edwin Morgan

LA UNUAJ HOMOJ SUR MERKURO

— Ni venas pace de la tria planedo.
Bonvolu konduki nin al via estro.

— Bor Streter! Bor. Bor. Streterhol?

— Jen plasta modeleto
de la sunsistemo, moviĝant-era.
Tie ĉi estas vi kaj ni estas tie kaj ni
nun estas ĉi tie kun vi, ĉu klare?

— Gol horop. Bor. Aborhanahana!

— Nia devenloko estas blua kaj blanka
kun bruno, komprenu, ni nomas la brunon
jenan ‚tero', la bluo estas ‚maro', kaj la blanko
estas ‚nuboj', super tero kaj maro, ni loĝas
sur la supraĵo de la bruna tero,
ĉio ĉirkaŭe estas maro kaj nuboj. Ni estas, homoj'.
Homoj venas —

— Glop homoj! Gorbener homojko. Homojhol?

— Homoj venas pace de la tria planedo
kiun ni nomas 'tero. Ni estas teranoj.
Konduku la teranojn al via estro.

— Zhomoj? Zhomoj? Bor. Borhosop.
Iaestro tan hana. Harabost iaestro.

— La iaestro estas mi. Vi vidas miajn manojn,
ni portas neniun bener, ni venas pace.
La spacovojoj estas ĉiuj streterhon.

— Glon pachomoj ĉiuj horabhana tantko!
Tan venas ĉe'mstrosop. Glop iaestro!

— Atomoj estas pahol en nia haraban.
Homojbat vorabost de tan hanahana.

— Vin homojn ni konas borhosoptant. Bor.
Ni konas iaestron. Iru strog reenspeter rapide.

— Ni nepovasabor, tantintingiri reenspeter nun!

— Banghaper nun! Jes, tria planedo reen.
Iaestro reiros bluon, blankon, brunon
nunhana! Plua parolado mankas.

— Gol han fasthaper?

— Ne. Vi devas reiri vian planedon.
Reiru pace, prenu vian gajnaĵon.
sed rapide.

— Stretervora gol, gol ..

— Kompreneble, sed nenio restas iam senŝanĝa,
ĉu ne vere? Vi memoros Merkuron.

El la angla (kaj la merkura!) trad.
W. Auld



Viĉon da vendejoj elfosas la arkeologoj sur la iama ĉefstrato en Gorsium.

Dumiljara gastejo

En la iama romia urbo Gorsium, apud Tác, la arkeologoj elfosas la restaĵojn de dumiljara gastejo. La deputitoj de la provinco alvenintaj al la urbo tie trovis loĝejon inter la grandiozaj muroj de la romia konstruaĵo. La gastejo detruiĝis ĉirkaŭ 260 p. K. kaj super ĝi oni konstruis en la 4-a jarcento vicon da domoj. Inter tiuj domoj troviĝis poste la ĉefstrato de tiu sekva urbo.

Ne nur rigardi sed ankaŭ vidi

Jam de dekkvin jaroj intense kunlaboras la hungara vojaĝofiĉejo IBUSZ kaj la Sciencpopulariga Societo TIT. Ili fondis Amikan Rondon de Lando- kaj Mondomigremuloj, kiu nuntempe jam havas pli ol kvardek mil membrojn. La ĉefa celo de la amika rondo estas helpi, antaŭprepari la partoprenontojn de la diversaj turismaj vojaĝoj per prelegoj, lumbildprezentadoj por la travivaĵoj, kiujn ili renkontos en la fremdaj landoj aŭ nekonataj enlandaj regionoj. Laŭ la spertoj duobliĝas la ĝojo dum la vojaĝo. se la turistoj jam scias ion pri la historio, geografio, faŭno aŭ folkloro de la koncerna lando. Eĉ post la vojaĝo ili volonte denove partoprenas prezentadojn pri la jam vizitita loko por vekigi la agrablajn memoraĵojn. Inter la multaj plimalpli grandaj rondetoj dise en la lando troviĝas kaj junularaj rondoj kaj tiuj de pensiuloj. Proksimume okcent prelegojn ili organizas ĉiujare meznombre kun cent aŭskultantoj. En la pasinta jaro oni aranĝis pli ol kvinmil ekskursojn enlandajn por kvaronmiliono da turistoj.



Simbola bildo pri la hungara krono el la 17-a jarcento.

La simbolo de la hungara historio post 33 jaroj denove estas hejme. Laŭ la historiisto la krono mem estas unu el la plej malnovaj de la Eŭropaj reĝjuveloj. Ĝi konsistas el du partoj. La supra parto de la krono estas donita de papo Silvestro la 2-a al la ŝtatfondanta Stefano la Sankta, en la jaro 1000.

La malsupran parton — kiu estas bendforma — sendis la bizanca imperiestro Miĥaelo Dukas al Géza la 1-a kiu reĝis de 1074 ĝis 1077. Sur ĝi estas greklingva surskribo.

La supra parto de la krono estas farita el arkformaj orbendoj kaj estas ornamita per bildoj de la apostoloj el klozoneo. Sur ĝi estas trovebla latinlingva skribaĵo.

La du partojn oni kunigis en la 13-a jarcento. Al la juveloj de la kronado apartenas la talaro, kiu devenas el la epoko de Stefano la 1-a, la sceptro kiu devenas el la 12-a jarcento kaj la regna pomo kun duobla kruco, kiu devenas el la epoko Anjou, kaj la flambergo el la 14-a jarcento.

Post diversaj sortoŝanĝoj, kiam la liberecbatalo senesperiĝis en 1849, oni subterigis la juvelojn apud Orŝova. La kesto estis trovita en 1853, kiam ĝi estis portita al Vieno.

La 8-an de julio 1867, oni metis ĝin sur la kapon de Francisko Jozefo. Lastan fojon oni uzis la hungaran kronon en 1916, ĉe kronado de Karlo la 4-a.

En la fino de la 2-a mondmilito multaj el la tiamaj hungaraj estroj rifuĝis, ankaŭ Szálasi, kaj liaj sekvantoj portis la kronadajn juvelojn al Germanio, kie ilin kaptis la Usona armeo. Post 33 jaroj finfine la hungara popolo denove posedas la kronon kaj la aliajn juvelojn.

ANORAMO

Ree al la karbo

Oni komencis per la terlaboroj la konstruadon de la plej granda termo-energio centralo de nia lando. Ĝia kapacito estas planita je 1920 MW-oj kaj ĝi ekfunkcios ĝis 1985 kun du maŝingrupoj po 210 MW-oj. Post tio sekvos ankoraŭ tri aliaj maŝingrupoj de la kapacito po 500 MW-oj. Ses karbominejoj liveros la karbon por la nova energiocentralo.

Laŭ direktivoj de la energio-politiko kaj laŭ realaj ekonomiaj kalkuladoj plej oportune estos de la 80-aj jaroj evoluigi nian elektroenergio produktadon per konstruado de energiocentraloj uzontaj atom-, aŭ termo-energion. Tial dum oni konstruas la atom-energiocentralon ĉe Paks, samtempe estas konstruataj ankaŭ energiocentraloj kun karbo-hejtado. Krom la plialtiĝantaj energio-prezoj en la mondmerkato ĉi tiun agon pravigas nia sufiĉe facile ekspluatebla karboprovizo en la meza kaj okcidenta partoj de Transdanubio.



Terlabormaŝinoj antaŭpreparas la terenon en Bicske.

Naturscienco en fremda lingvo

Nova klubo ekfunkcias de ĉi tiu printempo en la budapeŝta Naturscienca Studio de Sciencpopulariga Societo TIT. La enkondukaj prelegoj okazas en angla, germana kaj rusa lingvoj kun lumbildoj kaj poste sekvas interparolado de la aŭskultantoj. Ĉi tiu iniciato helpas al fakuloj, kiuj en siaj sciencaj branĉoj bezonas fremdajn lingvojn ne nur el faklibroj sed ankaŭ en la praktika, vivanta formo.

Por pli granda senĝena kovejo

Ĉiam pli grava temo estis en koncernaj sciencaj rondoj la futuro de la Malgranda-Balatono. Nun la Tutlanda Naturdefenda Oficejo preparis la planon, laŭ kiu oni plilarĝigos la ĝisnunan naturdefendan terenon de 1400 hektaroj je 7500 hektaroj. La plano koncernas la konservadon de ĉiuj naturaj valoraĵoj; la akvosurfaco, la marĉo, la kanaro kune kun la arbaroj apudaj kaj la kamparoj restos en siaj originaj statoj same la karakterizaj kunekzistadoj de kelkaj kreskaĵoj kaj la tie vivantaj bestoj. Speciale grave estas, ke la birdoj protektataj trovu sur pli granda tereno senĝenajn kovejojn.

La geografia plilarĝigo de la naturdefendado signifas samtempe ankaŭ la konservadon de la kulturaj, folkloraj valoraĵoj de la regiono. La Tutlanda Naturdefenda Oficejo intencas evoluigi la Malgrandan-Balatonon modelo de la medio-protektado donante al ĝi gravan rolon ankaŭ en la defendo de la akvo-kvalito de la Balatono.

Hejmece vivas la nobla ardeo en la kanaro de Malgranda-Balatono

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

240 lit. *
ultrafridujo 20-litra, -18 C°

Fridiga nutraĵkamero de la familio

Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR Jászberény

REVUO DE REVUOJ

Sistema, strategie organizita propagando faras miraklon — ĉu nur en *Irano*? La intervjuo en ESPERANTO kun d-ro *Saheb—Zamani* ekscitoplene prezentis, kiel estis disvolvita amasa E-a aktivado en tiu lando Azia. Unu bone utiligita sukceso postiris la alian, kvazaŭ „ĉenreagoj" eĉ en aliaj islamoj landoj sekvis la disen lanĉitajn problemojn, kiuj konsciigis en diversaj tavoloj la Babelan situacion. Pruviĝis denove, kiel gravaj estas personaj kontaktoj kun redaktoroj de amaskomunikiloj, por ke nia vekiga voĉo trovu la menson de pli-malpli aŭtoritathavaj personoj.

En la nuna epoko, tiom internaciema, jam ofte troviĝas fekunda grundo por nia lingvo. Se Irano eble ŝajnas al iu *virga tero* (ĉu aliaj landoj en la tn. tria mondo malsamas el tiu vidpunkto?), pri Britio neniu riskos aserti tion. Ne nur sensacia, sed eksplode skuanta la lingvan terenon estas la fondo de TUCEG en la Londona parlamento. E-Gurpo Sindikata kaj Kooperativa kreiĝis por akceptigi per la laborista movado la neŭtralan IL-on — informas i. a. VILÁG ÉS NYELV (Mondo kaj Lingvo) hungarlingva E-revuo la publikon, kaj montras fotokopie la anglan flugfolion (centmil ekz.!). Rajte vi emociiĝos, kara Leganto, ĉar ministroj, registoj, ĉefoj de partioj kaj sindikatoj subskribas kaj abcentas: „la angla (uson-angla) ne estos akceptebla kiel internacia lingvo", „per ĝi anglalingvanoj ricevus ne-merititajn privilegiojn kaj trudus anglan — usonan kulturon al la mondo" ...

La altrangaj britaj eminentuloj unuanime argumentas por E-o, kiu kapablas solvi la lingvan problemon, kaj estos lernenda kiel unua fremda lingvo en ĉiu lernejo de la mondo. Ni konsciu, ke flanke de la Labor-partio k. a. la lingva imperiismo estas eventuale forlasata, kvankam ĝis nun tiu sinteno estas por anglalingvanoj simple io „natura". En intervjuoj, faritaj de Imre *Szenes*, redaktoro de „Mondo kaj Lingvo", vico de gravuloj el la internaciaj kaj landaj sindikataj unuiĝoj taksis tiun procezon eksterordinare signifplena, ebliganta progresi lingvan interkomprenon de diversnaciaj laboruloj. La „bona ŝanco" (esprimo de W. *Bormann)* ŝajnas ne-rezisteble antaŭenmovi nian aferon.

El inter la multaj E-revuoj en Japanio nun alplume venas la ĉiam interesajn artikolojn publikanta OOMOTO. Pacamikon nepre varmigas la pactendencaj reciprokaj renkontoj kun usonaj eminentuloj; feliĉe, oni povas ofte legi en la E-gazetaro tiajn bravcelajn vizitojn eĉ tra grandaj distancoj: ni klare scias, ke tiuj tamen malgrandigas la distancojn — spiritajn. En la revuo cetere elvolvoĝis interesa disputo, lanĉita de japana profesoro, kiu kritikeme asertis, ke frazo-speco, kia ekzemple *„ne malpli bela ol ŝi"* egalas: *pli bela ol ŝi.* G. *Waringhien* kaj I. *Lapenna* refutis tiun percepton — kvankam ne sammaniere —, tamen la japana kolego malakceptis iliajn argumentojn, por la signifo *same bela kiel ŝi.* Kaj tiel plu, ke *„ne pli forta ol li"* ne estas simple turnebla je *malpli forta ol li.* Malsamaj perceptoj, certe, eventuale nian japanan samideanon tro influas matematika logiko, aŭ filozofia konsidero, laŭ kiuj du negacioj neŭtraligas sin — ankaŭ lingve: *„ne pli mala"* egalus *„plia".* Kompreneble la mondo reala ne lasas sin konduki aŭ interpreti per homfaritaj, striktaj formuloj (nomataj logikaj metodoj), sed ĝuste inverse: nia pensmaniero (nomu ĝin dialektika aŭ natursekva, laŭ via gusto) devas rezoni adekvate por realece speguli la multfacetajn rilatojn de la ekzistanta mondo. Matematika logiko ne sufiĉas por desegni, priskribi ĉion; nia genie konstruita lingvo eble plej reliefe montras la venkon super la „logike, skeme" elpensitaĵoj. Kaj E-o strebas esprimi *nuancojn* por plia distingo, sekve la citita virino povas esti *same bela,* aŭ eble — iomete — *pli bela ol ŝi.*

Ankaŭ el la fora oriento okulfrapas plezura afero: LA ESPERO — ne la sveda, sed el preskaŭ nova E-regiono, Suda Koreio, venis riĉe ilustrita, kolora revuo. Eil (Paul) *Kim* redaktas ĝin je lingva nivelo laŭdinde alta; kun historiaj kaj literaturaj skribaĵoj ekbrilas jen nova *lumturo* ĉe la Pacifiko. Trans tiu oceano la VENEZUELA STELO estas konata kiel fervora defendanto de la lingva pureco, (ankaŭ HV ricevis jam de tie kelkajn pravajn rimarkojn). Ĝuste tial mi konsideras signifa rekono, ke la revuo komplete publikis la Interkonsenton de hungaraj E-redaktoroj (kiel Lingva Komisiono de HV), kaj akceptis ĝiajn ortografiajn normojn pri personaj kaj geografiaj nomoj (vd. BUDAPEŠTA INFORMILO 1977. febr.), rekomandante, ke akceptu ĝin ankaŭ aliaj gazetoj. La redaktoro F. G. *Blánquez* publikis cetere en NOVZELANDA ESPERANTISTO (denove transoceanaĵo) mallongan, sed pensigan kritikan eseon pri la Plena Gramatiko. Tutcerte, kiel konkludas la eseo, la novan eldonon de P. G., planitan de UEA, oni devos revizii kaj kompletigi en la lumo de la lingvistika progreso.

HEROLDO DE ESPERANTO preskaŭ ĉiam devontigas atentan legadon per la varia enhavo. Post la artikolserio pri K. *Kalocsay,* literaturaj perloj legeblas (laste de Emilja *Lapenna)* en la Beletra Angulo de A. de *Giorgi.* Pri materialaj, altvaloraj muzeaj „perloj", kiuj ŝtelitaj ekmigradas tra ĝangalo de kontrabando kaj fimerkato al trezorujoj de malhonestaj riĉuloj — arkeologo Bernard *Golden* (krome premiita novelverkisto) malkaŝas la krimajn sekretojn, en la dankon meritanta Kultura Suplemento. Nu, pri alispecaj „sekretoj", UFO-j, mi legis kiel agrablan distran ĝenron la novromantikajn historietojn pri la aperantaj, sed ne kaperantaj „kosmuloj" en aŭ sen „teleroj" vagantaj .. Se temas pri kredo en tiuj modernigitaj anĝeloj, ni incitu neniun: haltu plumo!

Mi finas per aliaj hobioj, kies surprize vastan gamon sternas antaŭ la legantojn KOLEKTANTO, kvaronjara ilustrita revueto aperanta en Sofio. Pipoj, parfumoj, poŝtaĵoj (kompostisto bv. atenti!), papilioj ... kaj aliteracion finante: E-aĵoj, eks-librisoj, ŝakfiguroj ... ĝis specialaj fotoj, eble nur diabletojn kolektanto scias, kion ĉion kolektas ĝia legantaro, kiu ricevas por si fakajn sciojn kaj specialajn konojn de tiu organizilo kaj varbilo internacia. Mi emas kredi, ke ĝi efike kontribuos E-igi multajn en tiuj tendaroj, servante al multaj kongresanoj en Varna.

Ervin *Fenyvesi*

La poŝo de la civitano

La poŝo de la civitano ankaŭ en Hungario estas kavajo, kiu foje estas plenŝtopita, foje oscedas malplena. Ŝvelan staton ĝi havas plejparte dum la unuaj tagoj de la monato — kelkan tempon post la ricevo de la salajro —, sed baldaŭ ĝi laciĝas kaj supoŝeble sentas dormemon. Oni almenaŭ povas konkludi tion laŭ la maldecaj oscedoj du semajnojn poste.

Hungaraj poŝoj en 1977

Ĉu ŝvelis aŭ ŝrumpis hungaraj poŝoj dum la pasinta jaro? Oni ricevas diversajn respondojn. Mi havas konaton, kiu pasigis la feriojn en Egiptio kaj havas suspektinde novan *Ford-Taunus*, sed tre verve li argumentis pri la malkresko de sia vivnivelo. Aliulo diris, ke li ne ŝatas teoriumi, li ne volas vivnivelon, sed pli altan salajron. Troviĝis ankaŭ personoj, kiuj diris, ke jes ja, lia salajro estis plialtigita je 15 procentoj, sed kompense oni altigis la prezon de la kafo komence de la kuranta jaro je 40 procentoj, do, li perdis je la negoco. Mi volis konsole inviti lin por taso da kafo, sed li rifuzis: „Dankon... Jam de tri jaroj mi ne trinkas kafon, la kuracistoj malkonsilis..."

Kiel do statas tiuj poŝoj? Nu, ili certe kaŝas sekretojn, kaj mi malŝatas kaŝrigardi. Eble ili estas malplenaj. Sed unu fakto tamen dubindigas tiun supozon: la hungara loĝantaro momente havas jam pli ol cent miliardojn (cent mil milionojn; cifero kun dekunu nuloj!) da forintoj en la ŝparkasoj. Tio signifas, ke ĉiu hungara civitano — inkluzive ankaŭ bebojn jusnaskitajn — havas ŝparitan monon de dek mil forintoj, t. e. la trioblon de la meza monatsalajro dum 1977.

Pli objektive

Konstatinte la malcertecon de la privataj informoj, mi prenis la raporton de la Hungara Statistika Oficejo pri la jaro 1977.

Interesaj ciferoj. Miaj okuloj kuras al la rubriko »prezoj«. Altiĝo de 3,9%. Mia edzino ne volas kredi tion, plendante, ke la prezo de la fruktoj dum la aŭtuno atingis neniam viditajn altojn. Mi rimarkas aplombe, ke la membrokotizo de HEA kaj la abonprezo de Hungara Vivo restis senŝanĝaj. Ŝi sugestas, ke mi manĝu, do HV anstataŭ pomojn. Sen*frukta* diskuto. Mi serĉadu plu. La nominala meza salajro kreskis je 7,5%. Ĉe ŝi denove duba kapbalanco. Rapida kalkulo. Mirigite ŝi mem konstatas, ke ŝia salajro altiĝis je pli ol 20 procentoj... Kaj nun ŝi koleras. Resonas en mi la averto de mia patro: „Neniam diskutu kun virino pri mono... nek pri io alia."

Mi restas sola. Nun jam mi povas sondadi pli objektive. Ni vidu la plej gravan indikon. La nacia enspezo kreskis je 7,5—8%. Ne malŝatinda cifero. La industrio produktis pli je 7 procentoj. Kiel tio eblas? Ĉu la agrikulturo estis pli efika? Jes... Kresko de 7—8 procentoj, kompare al la jaro 1975. (La jaro 1976 estis malsukcesa, ĝi ne atingis la rezultojn de 1975.) Tamen, tio estas eĉ tiel 3,5—4% por jaro. Mi ne memoras, kiam io simila laste okazis en niaj vilaĝoj.

Sed mi revenu al nia poŝo. Kiom fakte nia vivnivelo altiĝis, malgraŭ ĉiuj prezaltigoj kaj similaj plagoj? Inkluzivante la valoron de la senpagaj aŭ subvenciitaj publikaj servoj, je 4,5 procenoj. Jes, la vendejoj bele enspezis. La valoro de la venditaj varoj altiĝis je pli ol 6 procentoj — laŭ kompareblaj prezoj... La tuta konsumo fare de la loĝantaro kreskis je 4—4,5 procentoj. Ni vidu la plej interesan punkton: kiom da novaj loĝejoj konstruitaj? 93 mil. Ne malalta cifero, sed ankoraŭ longe ni ne bezonos timi troprodukton...

Ekstera komerco

Ĉiu hungara sufĉinfano scias, ke pli ol duono de la hungara nacia enspezo realiĝas pere de la ekstera komerco. La abrupta kaj neegala altiĝo de la prezoj en la monda merkato (altiĝis grave preskaŭ ĉio, kion ni importas, kaj konservis sian prezon aŭ kostiĝis nur iomete tiuj varoj, kiujn ni eksportas) dum la lastaj jaroj englutis ĉirkaŭ 9 procentojn de nia jara nacia enspezo. Kio do okazis en 1977? Jen, ankaŭ nun daŭras la sama afero. La *valoro* de la eksporto kaj importo kreskis egale, je 16%. Sed la *kvanto* de la eksporto devis kreski je 12 procentoj, por kompensi la 8-procentan altiĝon de la importo. La bilanco de la komerco kun socialismaj landoj montras pozitivan saldon, en la rilato kun kapitalismaj landoj ne tre grandan deficiton. Nenia novaĵo... Pri la »importo« de turistoj: dum 1977 vizitis 12,4 milionoj da eksterlandanoj, kaj 4,7 milionoj da hungaroj vojaĝis al eksterlando. Esperantistoj certe dece kontribuis al la ĉi lasta cifero.

La poŝo de la ŝtato

Kutime oni supozas, ke ĝi estas plenŝtopita. Nu, relativa afero. Populara humuristo diris ĉe la jarturniĝo en radiokabaredo, ke lando kies ĉefministro havas la saman nomon, kiel la malriĉa homo en la Biblio, ne havas kaŭzon por fanfaroni. (La Biblia mal'riĉulo nomiĝis *Lazaro*, la hungara ĉefministro György *Lázár.)* Nu, ni ne devojiĝu, sed kontrolu rapide, por kio elspeziĝas tiuj kelkaj miliardoj da forintoj, kiuj ĉiujare troviĝas en tiu poŝego, t. e. en la ŝtata buĝeto?

Preskaŭ la kvarono — 24 procentoj — iras kiel subvencio al entreprenoj. (Bonkora ŝtato, ĉu ne?) Preskaŭ tiom, 19 procentoj estas ŝparitaj, t. e. reinvestitaj. 18 procentojn sumas sanitaraj, socialaj elspezoj kaj la kos-

toj de la socia asekuro. 10 procentojn manĝas la ŝtata administracio. (Supozeble inkluzive la policistojn de trafiko. Fakte ili povus bele vivteni sin per la mono, kiun ili de tago al tago forprenas de mi, argumentante, ke mi parkigas mian aŭton en malpermesita loko.) Estas iom konsola fakto, ke samgranda sumo estas dediĉita por subvencii prezojn. (Nur tiom? Ekzemple pano kostas same, kiel antaŭ 20 jaroj. Krome oni subvencias plurajn centojn da varoj; kelkajn pro tute nekonataj kialoj. Sed eble oni nur forgesis pri ili, mi ne volas doni sugestojn por prezaltigo ...) Ok procentoj servas por ceteraj elspezoj" kaj unu malpli por kulturaj celoj. La ministro de defendo devas kontentiĝi je 4 procentoj.

Kiel do ni vivas?

En serioza interparolo neniu hungaro kontestos, ke de jaro al jaro pli bone, kvankam kompreneble ne tiel bone, kiel ni volus. Tio cetere estas konstatebla jam ankaŭ laŭ la plendoj: oni neniam plendas (eĉ ne simbole) pri manko de pano, nek pri malhavo de dece dika tavolo da butero sur ĝi.

Nia prezaro montras altiĝantan tendencon, jare ĉ. je 4 procentoj. (Feliĉe ĝi ĉiam postrestas al la altiĝo de la salajroj.) La prezaltiĝo elvokas plendojn precipe ĉe la pli aĝaj homoj, kiuj alkutimiĝis, ke dum du jardekoj en Hungario funkciis sistemo de fiksaj prezoj. Tio vekis la senton de stabileco, sed havis ankaŭ malavantaĝojn. Fine iuj prezoj jam havis nenion komunan kun la vera *valoro* de la koncerna varo. Tio misorientis ne nur la konsumadon de la logantaro, sed ankaŭ la entreprenojn. Kaj ĝia natura sekvo estis malŝparado, kiu naskis siavice mankojn. Nun niaj prezoj iele-iome respegulas la valoron de la varo, kaj ni jam forgesis la tempon, kiam plurfoje dum la tago ni eniris la bućejon por informiĝi, kiam oni liveros viandon aŭ bonkvalitajn kolbasojn? Nun tiuj aĵoj ne alvenas en la vendejojn, supozeble ili kreiĝas tie, ĉar neniam mankas io, kaj ne nur en la grandaj urboj, sed en kiu ajn loko de la lando. Same ne mankas varoj importitaj kiel kafo, kakao kaj aliaj bazaj kaj malpli bazaj necesaĵoj.En vilaĝa bazaro oni povas elekti inter *nescafé* svisa, hinda kaj Dio scias kia.

Tio kompreneble ne signifas, ke ni ne havas ion por grumbli. Ekzemple mi grumblas jam de pluraj tagoj, ĉar mi ne trovas en la vendejoj certan tipon de fotelo kun difinita koloro. Troviĝas la tipo, troviĝas la koloro, sed neniam tiuj du ecoj en la sama meblo. Aliaj grumblas pro alia kaŭzo. Sed intertempe ni ankaŭ laboras, por havi venontjare malpli da grumblindaĵoj.

Vilmos *Benczik*

esperanto
esperanto
esperanto
NE ISSN 0014-0635

revuo kun renomo • inter la plej malnovaj • inter la plej modernaj • la plej legata • aktuala • fidinda • akurata

esperanto
esperanto
NE ISSN 0014-0635

- Monata revuo de Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun Unesko).
- La sola Esperanta periodaĵo, kies legantaro (en preskaŭ 90 landoj) nombriĝas kvincifere.
- Ĝia nomo estas tiel ĝenerala, ĉionampleksa, ĝuste kiel ĝia enhavo: Ĝi raportas pri ĉio sciinda el la aktuala vivo de la Esperanto-movado.
- La revuo ĵus eniris sian 71-an eldonjaron. Aferoj, kiuj ne valoras, ne vivas tiel longe.
- Neniu alia Esperanta periodaĵo liveras al vi tiom de paĝoj jare (264 kun kovriloj) por tiel malalta abontarifo.
- Abonprezo: 33,00 nederlandaj guldenoj. Perantoj en pli ol 30 landoj akceptas abonojn ankaŭ en la koncerna landa valuto.
- Petu specimenon de vialanda peranto aŭ rekte de: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176,, NL—3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
- Hungaroj povas aboni ĝin ĉe HEA por 1978 kontraŭ 100 forintoj.

LA SITUACIO KAJ EVULUADO DE ŜIRMADO KONTRAŬ INUNDOJ EN HUNGARIO

D-ro Ferenc László

I.

De praaj tempoj luktas la homo kontraŭ riveroj, senbridaj riveretoj por ŝirmi sian hejmon kaj sian havaĵon kontraŭ detruoj far inundoj. Tiu ĉi lukto signifas ankaŭ nuntempe grandan fortostreĉon, ja en multaj landoj sur la Tero estas oftaj la proinundaj katastrofoj, ne unufoje postulantaj homajn vivojn.

En Hungario pro ĝia geografia situo, kaj orografiaj cirkonstancoj la kontraŭinunda ŝirmado havas tre grandan signifon. Tion pruvas konvinke, ke kvaronon de la landa teritorio, ĉ. 2,5 milionojn da hektaroj, protektas digoj kontraŭ detruoj de akvoj inundaj. Laŭlonge de la digoj, — 5—6 metrojn sub la inundonivelo — situas pluraj el niaj urboj kaj vico da komunumoj kun po 10-15 mil loĝantoj. Sur tiu teritorio vivas 30% de la loĝantaro de la lando, kaj estas taksebla je 500 miliardoj da forintoj la valoro de naciaj havaĵoj akumuliĝintaj sur tiuj teritorioj.

Ĉi tiuj indikoj konvinke pravigas: en Hungario grava kondiĉo de la socia, ekonomia evoluo estas, ke ni estu sekurigitaj kontraŭ inundoj. En Eŭropo sole la inundodanĝero de Nederlando havas similan gravecon, tamen tie nur 20% de ĝia teritorio situas pli profunde ol la nivelo de indundoakvoj.

La hungara kontraŭinunda ŝirmado havas grandajn pasintecon kaj tradiciojn. Kompreneble, estis longa, malglata — kaj akompanata de multaj inundokatastrofoj — la vojo por evoluigi la protektadon de inundominacataj regionoj, ekde la komencaj laboroj en la 12-a, 13-a jarcentoj ĝis la hodiaŭa (ankoraŭ eĉ nun ne kompleta) elkonstruado, kiam jam 4400 km-jn longa digaro defendas la minacatajn teritoriojn.

Konstruo de ronda digo ĉe Dénesmajor kontraŭ la inundo en j. 1974.



Glaci-rompila ŝipo sur Supra Tiso

La hungararo lokiĝinta en la baseno de Danubo-Tiso okupiĝis en la komenca tempo pri bestbredado. Dum la plurjarcentaj defendaj militoj (kontraŭ germanoj, tataroj, turkoj, ktp.) maldensiĝis la loĝantaro tiom, ke oni trovis sufiĉajn loĝteritoriojn sur la montetaj regionoj kaj sur altaĵoj en la inundominacataj terenoj, kie ĉirkaŭe kuŝantaj marĉoj prezentis eĉ defendon kontraŭ malamikoj. Tiel ili ne sentis imperativan neceson ŝanĝi la praan naturstaton.

Tamen paralele kun la plimultiĝo de la loĝantoj en la sekvaj jarcentoj kaj pro evoluo de sociaj-ekonomiaj cirkonstancoj laŭgrande aperis la neceso liberiĝi de inundominacoj. Antaŭ la apero de Stefano *Széchenyi* en la hungara politika kaj kultura vivo (1825), estis konstruitaj ŝirmdigoj en la valo de Danubo 464, en valo de Tiso 328 km-jn longaj, kiuj protektis kontentige 345 000 hektarojn kontraŭ inundoj. Eĉ se tiuj digoj ne sufiĉis okaze de pli grandaj inundoj, ili tamen havis grandan influon je la ekonomia vivo de la lando.

Grandan instigon alportis por la kontraŭinunda protektado la ĝenerala ekprospero karakterizanta la reformepokon (1825—1848), kiam laŭ iniciato de Stefano Széchenyi komenciĝis kontraŭinundaj laboroj alportantaj tre gravajn rezultojn.

Kiam ĉesis la turka regado en Hungario (1689), grandaj teritorioj estis sub akvo kaj tio tre malfaciligis la tiaman vivon, eĉ sen tio amaran. Vastegaj grundoj estis nekultivitaj, la vojoj detruitaj. Por iom grandaj distancoj ekzistis nur unusola transportebleco: la akvo de Danubo, sed ankaŭ tiun baris sudoriente la rifoj de Ferpordego. En la 18-a jarcento la kultivo kaj eksporto de greno estus povinta ekvilibri la renversiĝintan ekonomian bilancon de la lando. Oni ja pensis pri la senakvigado de marĉoj, konstruado de kanaloj, akvovojoj, sed

la materialaj fortoj de la lando sufiĉis nur por la plej elementaj, primitivaj paŝoj.

Post la provizora ekprospero kaŭzita de Napoleonaj militoj eksplodis la krizo, kiu kondukis al la reformmovado. Komenciĝis la lukto por ĉesigi la feŭdajn cirkonstancojn, por kreo de memstara kaj varprodukta ekonomio, kiu lukto fine kulminis per la nacia sendependeca milito en 1848. La reformepoko metis sur tagordon ankaŭ la nerealiĝintajn iom grandajn hidrologiajn laborojn, ja sen tio oni ne povis eĉ pensi pri reordigo de la agrokulturo, industriigo kaj kreo de la dezirata aŭtonoma internacia komerco.

La tiam efektivigitaj senakvigoj, forigo de inundodanĝeroj, aranĝo de grundakvoj kaj riverreguligoj ŝanĝis, transformis la fizionomion de grandaj landpartoj. Ne vane oni mencias kiel duan patri-okupadon, la hidrologiajn laborojn de la reformepoko. En tiu nova patriokupado rezultplene kunlaboris pluraj membroj de la eminenta inĝenieraro de la pasinta jarcento, inter ili plej alte staras Paŭlo *Vásárhelyi* kaj Jozefo *Beszédes* per sia valorega agado.

La koncepto de P. Vásárhelyi pri la reguligo de rivero Tiso atestas tian genian menson, je kiu rerigardas la posteularo kun granda honoro kaj respekto. Tiu plano estis eĉ per siaj nudaj ciferoj en mezuro nekomparebla: en sia tuto ĝi estis forigonta la inundodanĝeron sur preskaŭ tri milionoj da akreoj per sia pli ol du mil kilometrojn longa digaro en regiono de Tiso-valo. Tamen ne sole laŭ ĝiaj mezuroj, sed ankaŭ laŭ la tuta koncepto rekonas la ekspertoj tiun planon moderna, ekzemplodona, eĉ, kio estas pli: hodiaŭ la hidrologiaj fakŭloj de la nuntempo — por solvi la akvoekonomiajn taskojn de ĉi tiu tereno, iras sur tiu spirita pado — kies direkton montris tiutempe P. Vásárhelyi: *„La plano konstatas la farotaĵojn apogante sin sur la riĉa indikmaterialo de la hidrografio de Tiso, motivas la neceson, efektivigi tratranĉon ĉe riverkurbo, okupiĝas pri digokonstruado, almontras la atendeblan altiĝon de la inundonivelo kiel sekvon pro la malpliiĝo de inundaj akvorezervejoj, konigas la necesajn reguligajn konstruaĵojn, kaj pretere mencias la taskojn de la hidrologia evoluigo".*

Tiu laboro komencita de Vásárhelyi daŭras ankaŭ en la nuna tempo. La rekono, — ke la ekonomia kaj kultura evoluo de ĉi tiu regiono de la lando koneksas kun la reguligo de Tiso kaj kun utiligo de ĝia akvo, — nediskuteble rilatas ankaŭ nian epokon. Nome ni kon-

*vidu HV 1977/2, paĝoj 19 kaj 22

Digo apogo per sablosakoj apud Sebes-Körös, ĉe Szeghalom, 1970.

Glaci-eksplodigo sur Supra Tiso

vinke deklaras, ke la akvo estas unu el la decidaj faktoroj de socia-ekonomia evoluo de iu regiono.

La Tiso-reguliga plano de Vásárhelyi estis parto de landon konstrua programo. Ĝia kompleksa perspektivo kapabligis ĝin, ke konforme al la nuna similtendenca vidmaniero difinu je jardekaj perspektivoj la farotaĵojn de la estonta akvoekonomio, — kaj ĉion ne el vidpunkto provincaspekta, sed leviĝante super la lokaj interesoj, — tamen ankaŭ tiujn servante, — konstruu kaj por tiu landparto kaj por la tuta nacio.

La koncepto de Vásárhelyi efikante tra jarcento organisme koneksas kun la pretendoj de la hodiaŭaj hungaraj socio kaj ekonomia vivo. Lia Tiso-akvoreguligado donis la bazon al la tiu grandioza konstruaĵo, kiu nun donas ŝirmantan digon en pli ol 4400 mil km-a longo. Tiu digaro liberigis preskaŭ trionon de la landa teritorio tiel, ke ĉesiĝis la regado de supreniĝantaj grundakvoj kaj de marĉoj, per tio donante eblecon por agrokultura kaj industria evoluo en la tuta valo de Tiso. Laŭ la Vásárhelyi-koncepto povis realiĝi unu en la plej grandaj akvoekonomiaj konstruaĵoj de la lastaj jaroj: la akvonodo ĉe *Kisköre**, per kiu la viviga akvo kreos abunde produktemajn grundojn, florantan agronomion kaj laŭtempan industrion, bonstaton baldaŭ sur ĉi tiu tuta teritorio.

La produktema vivo de la alia granda hidrologia inĝeniero: Jozefo *Beszédes,* laborinta en la sama reformepoko, — ankaŭ atestas individuon simile ageman, estonton formantan, kreantan. Malgraŭ tio, ke la nomo de Vásárhelyi pli forte enradikiĝis en la publikan opinion, ol tiu de Beszédes, estus malfacile aserti konscience, ke el inter ambaŭ iu estus pli granda ol la alia.

La homo de la nuntempo, kiu ĝuas la akvon de nia mirinde bela lago *Balatono* en la cerbsekiga somera varmo, eĉ ne pensas — escepte kelkajn fakulojn — ke laŭ la kreanta laboro kaj en futuron montrantaj planoj de J. *Beszédes* ekiris la naturon transformanta lukto kun la fortoj de la spitema naturo. Tiu lukto estis en mezuroj kaj teknikaj planadoj grandioza, kompleksa, — kaj tiel ĝi povis igi el la grundakva marĉomondo abunde produktantan, kulturitan teritorion, kia estas nun la plej bela ripozloko: la bordaj regionoj de Balatono.

Komence de la 19-a jarcento vere estis tiu teritorio kovrita de marĉoj, grundakvoj; dekmiloj da akreoj es-

tis inunditaj pro la ŝanĝanta akvonivelo de la lago, — sed la fizionomion de la regiono aliigis la efektiviĝintaj planoj de J. Beszédes, laŭ kiuj estis konstruita la 176 km-jn longa kanalo Ŝio*, krome la reguligo de riveretoj *Sárvíz* kaj *Kapos* (tiu lasta akceptas la Balatonan akvon per Ŝio, kaj kuniĝante kun Sárvíz enfluas en la Danubon). Antaŭ 115 jaroj, en 1863 pretiĝis en la sama plankadro la kluzo de Ŝio ĉe *Siófok*, kiu reguligas la konvenan akvokvanton de Balatono, entute ĉ. dumiliardon da m^3 da akvo.

La reguligo de la lago, kaj la akvaj konstruaĵoj tion sekvintaj — konstruo de bordaj muroj, havenoj, ripozejoj, plaĝoj — ebligis la rapidegan evoluon de tiu regiono. Ne estas hazardo, ke de 1863, de finkonstruado de la kluzo datiĝas, ke Siófok kaj la aliaj surbordaj komunumoj estas rigardataj: *banlokoj*. Tiam komenciĝis la evoluado de la baneja vivo ĉe Balatono.

Grandan koncepton de Beszédes respegulas ankaŭ la planado de *Danubo—Dravo-kanalo*, kies plano aperis en fakrevuo en 1843. Kiel liaj pli fruaj ideoj, ankaŭ tiu estas grandioza, lia pensado anticipis sian epokon. La problemojn li neniam rigardis apartigitaj. Li rekonis la interrilatojn de la solvendaj diversaj taskoj, li deziris tiujn solvi harmoniigite, en ilia tuto. Vere, li estis pioniro de la moderna akvoekonomia aspekto.

Tion bone respegulas sekvaj frazoj el lia verko, *»Prove el Hungarlanda hidrotekniko«: »Ankoraŭ eĉ unu nacio ne ornamiĝas per landa hidrotekniko, kvankam tio estas nepre necesa scienco por la akvoj de kulturita lando, ke ja ne estu en ilia regulacio (en regulado de la akvoj, la trad.) laborigitaĵoj tienreen: tio estas sen ĉiu ajna respekto por la tuto, pli malfrue iu laboro estu malhelpo por la alia. Ĉiuj spertaj akvomezuristoj (inĝenieroj, la tr.) ekkonas ĉi tion. Pechmann kaj Wiebeking plendas pro la malboniĝo de ĉiuj Eŭropaj riveroj, pro la apartiĝinta prilaboro.«*

Lian elokventan grandecon montras ankaŭ tio, ke li klare vidis la taskojn farendajn por la ekprosperigo de la lando sur tereno de evoluigo de agrokulturo, komercado, trafikado, ktp. kaj sian laboradon teknikan li subordonis al tio. Klara pruvo pri tio estas sekvanta detalo el lia artikolo kun titolo: *„El inĝeniereco adaptita je kampara ekonomio, industrioj kaj komercado."* Jen la citaĵo: *„Tiam komenciĝas la Kulturo de l'Nacio, en kiu ĝi kiel antaŭiras (prosperas), tiel ĉiu ĝia zorgo devas aliĝi, ke ĝia tero iĝu tiu neŝancelebla fundo de sia ekzistado, kies plej alten levita uzado servanta kiel bazo por sia nacio, kiu neniam devu timi iun ajnan eksteran aŭ internan mizeraĵon."*

*„Sed la plej alten levita uzado de l'tero konsistas plej ĉefe el tio, ke ni povu savi surfacon for de superflua humideco, sed la necesan malsekigadon laŭ nia plačo povu doni al ĝi, ni povu malhelpi la difektadon de la surfaco de la kultivita tero, kaŭzitan far de pluvado, aŭ neĝa suko, kaj la tiom necesan popolaron ni bone utiligu en la lando. Tiuj estas la objektoj altaj de la Inĝeniereco, la kaŭzoj en la landa kampara ekonomio."**

Tutan vivon, ĉiun aktivecon de Beszédes gvidis la devkonscio al lia patrio kaj popolo, kaj li estis inda filo de la epoko de nacia renaskiĝo. Per siaj kreaĵoj, kiuj ankoraŭ dum jarcentoj anoncos lian grandecon, li enskribis sian nomon sur gloraj paĝoj de la hungara nacio.

Beszédes ne sukcesis senmanke efektivigi siajn teknikajn planojn kaj progresajn ekonomi-politikajn principojn, kiuj en hidrologiaj rilatoj donis spiritajn motivigojn ankaŭ al la laboroj de *Széchenyi*, ja liaj ideoj transvivis sian epokon kaj donas eĉ hodiaŭ en multaj okazoj — vivantan, praktikan vojmontron al ni.

Liaj grandaj projektoj, opinioj de akra vido kaj vasta horizonto pri la akvaj konstruaĵoj kaj akvo-ekonomio, estas unu de niaj plej valoraj havaĵoj. Ni devas atingi plenvaloran utiligon kaj tion ni povas efektivigi en nia socia sistemo. Por la evoluigo de la akvomastrumado en harmonio kun la socialisma ekonomio kaj socia prospero la vojon malfermis la deklaro pri la socia propraĵo en nia konstitucio, kaj tio ebligis la pluan evoluigon de nia sistemo por malhelpi la inundo-nocojn.

En la pasintaj tri jardekoj la evoluon de la kontraŭ inundaj aktivadoj karakterizas la laboro por la pligrandigo de la ŝirmadkapablo de la digoj. Tiam la ŝirmaj diglinioj donis sekurecon kontraŭ inundoj: en la Danubregiono meznombre 40 jaran, en Tiso-valo meze 65 jaran, tutlande resume 60 jaran oftectemplimon. Nia evoluiga principo estas, ke niajn ĉefajn ŝirmantajn liniojn ni elkonstruu meznombre por ĝenerale 100 jara,

Ŝirmado kontraŭ inundo ĉe enfluejo de rivereto Szinva (Szinvatorok)

*vidu: HV 1977/2 paĝoj 22, 24, HV 1977/3, p. 24 kaj en la kvara n-ro, paĝo 23

*Rim.: tradukisto klopodis imiti la antaŭ 120 jaran hungaran teknikan lingvon.

Leĝer-skafandristoj dum laboro

cirkaŭ la pli valoraj teritorioj por 150 jara, kaj por gravaj, grandaj urboj por miljara danĝerec-ofteco.

La rezultojn atingitajn en la pasinta jaro karakterizas, ke en la jaro 1945 la tero enkonstruita en la digojn estis 195 milionoj da kubmeteroj, en 1977 tio atingis 280 milionojn da m^3. Inter 1945 ĝis 1960 oni enkonstruis 15 milionojn da m^3, sed en la 4-a kvinjarplano, inter 1971—1975 jam 24 milionojn.

Ekde 1945 ni eluzis 8,5 miliardojn da forintoj por fortikigo kaj konservado de la digaro, — el tiu sumo 7,2 miliardojn en la lastaj dek jaroj. Rezulte de tiu granda laboro en 1977 la longeco de la digoj, pretkonstruitaj je la preskribitaj mezuroj laŭ la evoluigaj planoj, atingis 55% tutlande.

Per la scienca esploro kaj analizado de la kondiĉoj: kiel eltenas la digoj la akvon dum la inundoj, evoluis raciaj metodoj por la digfortikigoj. Ekz. sur la plej danĝeraj etapoj ĝis nun konstruiĝis, akvorezistaj muroj sur aliaj lokoj senakviga putaro kaj basenoj donantaj kontraŭpremon.

Samtempe kun la fortikigoj de digoj ni konstruis modernajn elektrizitajn digogardistajn koloniojn kun bona trinkakvo, kaj krome ŝirmo-centrojn, alirajn vojojn, telefonliniojn kaj fortikigitajn konstruaĵojn.

La spertoj akiritaj dum inundoj evidentigis, ke krom la dig-fortikigoj oni devas evoluigi por pli granda sekureco: loklimigajn digojn, rondajn digojn, senakvigajn sistemojn, rezervujojn. La rezervujoj havas grandan signifon precipe ĉe riveroj de impetaj akvofluoj, helpe de rezervujoj ni povas sekurigi pli valorajn terenojn per la subakvigo de senvaloraj terenoj. En valoj de riveroj Körös ĝis nun realiĝis konstruaĵoj por rezervado de 300 milionoj da m^3 akvo. Krome ĉe la limoj jam estas pretigitaj lokalizaj digsistemoj.

Malgraŭ la bonaj rezultoj en nia digkonstruado, granda parto de niaj digoj ne prezentas ankoraŭ la deziritan sekurecon. La digaro ja estis konstruita, fortikigita dum cent jaroj, kaj la materio heterogena, la laboroj ne ĉiam estis ekspertaj, tial povas troviĝi kaŝitaj malboniĝoj: kontraŭ tiuj oni devas esti ĉiam defendopretaj jam ankaŭ tial, ĉar iam ajn ni devas kalkuli je tiaj eksterordinaraj naturaj okazaĵoj, kiuj ekstreme atakas la digojn.

Kun la unueca hidrologia servado samtempe estis organizita la unueca ŝirma organizaĵo. Per la konstante kompletigitaj teknikaj instrumentoj kaj materioj tiuj

Konstruo de kontraŭinunda digo ĉe Drávaszabolcs

Protektado kontraŭ inundo en regiono de Felsőberecki

organizaĵoj jam pretas por kontraŭbatali ne tro grandajn inundojn. Tiuj modernaj teknikaj helparanĝaĵoj por rezulta ŝirmado estas:

— hidroservaj telefonlinioj laŭlonge de la ĉefaj defendolinioj;

— ultra-kurtondaj (UKO) radioreto sur sidejo de ĉiu hidrologia direktoraro kaj etap-inĝenieraro, sur granda parto de la defendaj centroj kun fiksaj antenoj;

— porteblaj kaj en aŭtomobiloj muntitaj UKO radioaparatoj, kiuj ebligas rapidan kontakton inter iu ajn defenda loka centralo kaj la landa centralo;

— aeroplanoj por rapida kontrolo de la inundo-situacio, kaj precipe por raporti pri la glaciiĝoj;

— bildmagnetofono kaj bildtelegrafo, kiuj donas orientiĝon en la tutlanda gvidado de la ŝirmadoj.

La kontraŭinundaj konstruaĵoj kaj organizaĵoj certigas, ke — escepte de ekstreme grandaj katastrofoj — la institucioj povas ŝirmadi kontraŭ inundoj el propra forto. Tion pruvas la aŭtunaj kaj printempaj inundoj de j. 1976, kiam pruviĝis, ke ne estis necese elpreni amasojn da homoj, maŝinoj, instrumentoj el la normala ĉiutaga produktado.

La celo do estas: atingi, ke inundoj ne ĝenu, maltrankviligu la vivon de nia socio kaj la produktan laboron. La kvina kvinjarplano projektas tion efektivigi.

La plej gravaj investadoj en tiu planciklo: daŭrigo de la digfortikigo inter *Baja—Solt* (apud Danubo); evoluigo de la ŝirmaj aranĝaĵoj en la internaj partoj de urbo *Győr* (apud Danubo); digofortikigo sur maldekstra bordo de rivero *Bodrog,* fini la saman laboron ĉe *Szamos,* — kaj konstruo de bordaj muroj en urbo Szeged. Por tiuj investadoj ni faros terlaboron sur longo de 273 km.

Ni provizas per kontraŭinundaj ilaroj, maŝinoj la defendajn organizaĵojn, ni evoluigas ties teknikajn kapablojn. Estas elkonstruata la evoluo de moderna hidrometeologia reto kaj plibonigo de la hidrologiaj antaŭsignaj raportoj.

(Daŭrigota en la sekva numero)

Tr. Alfonso *Pechan*

HISOPO - PIEDTINKTURO

Nur por uzo sur korp-eksteraĵo!
Ĝi enhavas eksluzive nur vegetaĵajn efikkomponantojn.

Ne medikamento, sed ne malhavebla sekurigilo de la moderna piedflegado, higiena zorgado.

Ĝi defendas vian sanon, laborkapablon per la malpliigo de pied-ŝvitado, ĉesigo de malagrablaj piedodoro kaj jukemo.



Uz-konsiloj:

Lavu la piedojn zorgeme, viŝu ilin tute sekaj. Peniku la interfingran haŭton per vatotufo tordita sur stangeto kaj trempita en Hisopo-piedtinkturon, — simile la plandon kaj ĉiun haŭtparton, kie pro haŭtkrevaĵoj, jukemo aŭ pro alia malagrablajo estas konjektebla komenciĝanta mikozo. La penikitan haŭtsupraĵon lasu tute sekiĝi.

Ripetu la penikadon en la unua semajno ĉiutage, en la dua semajno ĉiun duan tagon. Proksimume post du semajnoj 3—4 fojojn penikŝmiru denove, por ke la unua kuracado sukcese finiĝu.

Krome ni konsilas, ke en ĉiu tria — kvara semajno bonvolu kompletigi la ĉiutagan sinlavadon per zorgema, pedanta Hisoptinktura ŝmirado.

Post la manipulado — por eviti eventualan haŭtsekiĝon — ŝmiru la haŭton per grasa kremo.

Fabrikas:

„SZILASMENTI"
MGTSZ

LABORATORIO DE KURACPLANTO-PRILABORO
KAJ DE VOLATILAJ OLEOJ
H—2144 KEREPES

Esperanto-vivo

La 80-an naskiĝtagon festis *Olga Hamvai* pasintjare la 2-an de aŭgusto en Nov-Zelando, Auckland, en familia rondo. La hungaraj esperantistoj ekkonis ŝin antaŭ pli ol 40 jaroj, kiam la blonda estonino el Tallinn kaj d-ro *Johano Hamvai* iĝis esperantista familio en Budapeŝto. La aktiva samideana paro akiris multe da simpatio inter la movadanoj, kaj oni estis konvinkitaj, ke ilia agado fervore daŭros ankaŭ en la alia hemisfero, kie ili trovis novan hejmon post la milito. Ŝia filino ankoraŭ en Budapeŝto faris ankaŭ esperantistan geedzigon kun hungara junulo, do patrino kaj filino en sino de tri nacioj prenis sian parton el la movada laboro. Ges-anoj Hamvai faris poste en 1960 longan prelegvojaĝon por kaj per Esperanto en Eŭropo (sub egido de UEA), kies belan sukceson forte helpis ŝia bonega lingvoscio krom lan sindona entuziasmo de ambaŭ gesamideanoj. Fore de la karaj hejmlandoj Eŭropaj, ankaŭ por iom profundiĝi denove en la vivo hungara, tradukis ŝia edzo ne senhelpe de Olga — al E. la romanon de *Gárdonyi*, pri rava mezepoka temo: *„Sklavoj de Dio"*. Olga Hamvai ankaŭ nun partoprenas en la loka E-vivo. Al la multaj gratulantoj alstaras ankaŭ — malgraŭ la distanco — ŝiaj hungaraj malnovaj konantoj, kaj ankaŭ *Hungara Vivo* deziras al ŝi longan vivon.

INTERNACIA LITERATURKONKURSO „LARIUS"

Sub egido de ŝtataj kaj sociaj instancoj kaj aŭtoritatuloj, en la Nord-Italia urbo *Como* jam la trian fojon estis organizita la konkurso de italaj kaj Esperantaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj. Pli ol cent aŭtoroj el 30 nacioj sendis poetaĵojn, tre konataj nomoj kaj novuloj kune konkursis por la valoraj premioj; jen la venkintoj de la Esperantlingvaj brancoj:

Originalaj poemoj (102 verkoj):

1. Albert *Goodheir*, Skotlando (Boatkonstruanto)
2. Eli *Urbanová*, Ĉehoslovakio, (Sorĉistino)
3. J. *Kohen-Cedek*, Israelo (Je gloro de miaj amataj).

Tradukitaj poemoj (70 verkoj):

1. Mauro *Nervi*, Italio (Sapfo: Taksas mi beata)
2. Simeon *Simeonov*, Bulgario (Deteljanov: Momento)
3. Nadia *Andrianova*, Sov. Ukraino (L. Ukrainka: Ave Regina).

Laŭdan mencion ricevis i. a. Tibor *Bessenyei*, Hungario.

La konkurso, nomita pri la famega naskito de Como, *Alessandro Volta*, de jaro al jaro etendas sian altirforton inter niaj talentuloj. La alta literatura nivelo kaj la valora propagand-efiko grandparte ŝuldiĝas al la organizantaj sekretarioj („laŭda mencio" niaflanke): Aldo *de Giorgi* kaj Marinella *Cantinazzi*.

KVAR VALORAJN LIBROJN

vi povas aĉeti je tre favora prezo **ĝis la fino de la kuranta jaro.** Ne maltrafu la okazon!

Koko krias jam! estas grandsukcesa originala novelaro, **De paĝo al paĝo** enhavas spritajn eseojn pri famaj Esperantaj verkistoj, **Kvaropo** kvazaŭ ponto interligas la duan kaj trian periodojn de la originala poezio, **En maskobalo** faras por vi legeblaj kune kvin unuaktaĵojn de Julio Baghy.

Unuaranga literaturo sur 700 paĝoj, por entute 35,— ned. gld. Abonu la serion sendante vian pagon al la Libroservo de UEA aŭ al via kutima librejo. Hungaroj abonu la serion per la ordinara enpagilo de HEA por 150,— forintoj. La serio estas mendebla ankaŭ en aliaj socialismaj landoj ĉe la landa asocio!

LITERATURA METIEJO

Stilo-variantoj

Ke multmaniere eblas prirakonti aĵojn aŭ aferojn, estas bone konate. La riĉa stoko da plej diversaj esprimiloj de la lingvo Esperanto ebligas vere vastan elektadon — same kiel en aliaj lingvoj. Kia formo-trezoro prezentas sin! Apud la sinonimoj de vortoj (vd. en HV 77/4.) jen la parenc-esprimoj, eĉ „frazo-paneloj", la senlimeco de vortkunmetado, krome la varieblec o de gramatikaj strukturoj — ĉiuj povas efiki jen nuance, jen kontraste, eventuale false, aĉe. Pere de tiuj kaj aliaj stilelementoj eblas — laŭ konoj kaj gusto — pli-malpli precize kaj delikate komuniki faktojn kaj sentojn. Depende de la temo, intenco kaj propra karaktero, la direndo devos ricevi konforman, decan stilon. Por atingi pli da impreso, oni selektu pli konscie el inter la lingvaj esprimiloj, ke pere de la formo- kaj enhavo-eroj prezentu sin harmonio: kompleksa estetika — belliteratura — efiko.

Ni prenos nun teksto-modelon el *sciencpopulariga* libro:

> En antikvaj tempoj ekestis ĉe ĉiuj apudmaraj popoloj de la Mediteraneo pri la fokoj diversaj fantaziaj rakontoj, kaj de ili originas certagrade la fabeloj pri marfeinoj, sirenoj. Tio estas certagrade komprenebla. La nekleraj homoj, kiuj tiam kredis je diabloj, sorĉistinoj, spiritoj kaj feinoj, ektimis, kiam subite prezentiĝis el la maro ronda, homsimila kapo kun elstaraj lipharoj kaj du grandaj okuloj. Vera fantoma aperaĵo de vila homo! Paralele kun la kleriĝo de la popolo perdiĝis ankaŭ tiaj kredoj, sed en la tradicio ili konserviĝis ĝis hodiaŭ.

Tiun stilon karakterizas la asertaj frazoj (ofte kunmetitaj), la simpla, klara vortordo, oftas montraj pronomoj. La teksto — cetere la tuta libro — prezentas ĝueblan ne sekan, legindan stilon. La frazordo estas logika, forte helpata per adverboj (kompreneble, paralele, certagrade) ankaŭ en prepoziciaj formoj.

Ni formu la tekston kun *pli populara stilo* — helpe de sinonimoj kaj iom da kompletigoj, resp. forlasoj.

En la *malnovaj* tempoj ĉe la Mediteranea maro *oni kreis plurajn fabelojn* pri la fokoj. *Verŝajne* el tiuj fantaziaj *inventaĵoj devenis* la figuroj de maraj feinoj kaj sirenoj. Tio ŝajnas komprenebla, ĉar laŭ *la tiamaj homoj ekzistis* diabloj kaj feinoj, spiritoj kaj sorĉistinoj. — Imagu, kia *surprizo kaptis* la *naivajn fiŝistojn*, kiam *neatendite aperis* super la akvo homforma kapo kun *brilaj* okuloj kaj lipharoj. *Mistera estaĵo . . .*, certe ia diablo aŭ feino! — Dum la jarmiloj tiuj *imagoj* pli kaj pli *malfortiĝis*, la kreskantaj konoj *lasis memore* nur la fabelojn pri tiuj figuroj.

Kurzive staras la gravaj sinonimoj. — La iom rigida, laŭfaka originalo iĝis nun stile pli bunta kaj facila, la tuto proksimiĝis al rakonta stilo (vd. anstataŭigon de: ekestis, diversaj, certagrade, klera, prezentiĝis, paralele, konserviĝis k. s.). Malmultiĝis adverboj kaj pronomoj.

Ni turnu la tekston al la kontraŭa direkto, al la *scienca stilo.* Oni aplikas tiucele — ĝenerale — sciencajn terminojn, striktajn vortkunmetojn, pli koncizajn gramatikajn strukturojn.

Koncerne la fokojn la antikvaj Mediteraneaj popoloj kreis multajn mitojn. Pri la duonhomaj-duonfiŝkorpaj mitaj figuroj la folklorscienco jam pruvis ties striktan interligon kun la fokoj (multe pli oftaj en la Mediteraneo dum la antikveco). La klariĝo troviĝas grandparte en la ŝajna homsimileco de la fokokapoj (ĉe certaj rasoj), havantaj kvazaŭ homajn mezurojn kaj trajtojn. Ekvido de tiaj fokokapoj, precipe en danĝera vetero, motivis tordmiksitaĵojn en la fantazio, kaj la antropomorfismo orientis tiujn ĝis duondio-grado.

Estas konataj la marfeinoj kun fiŝvosta korpofino, same la maristojn logantaj sirenoj, k. a. La mitorestaĵoj pluvivis parte en la literaturo, parte en la fabeloj de la insulanoj kaj de la marbordaj popoloj.

Iel tiamaniere ekzemple en universitata lernolibro. La kara leganto certe trovas (kaj substrekas) la vortojn uzitajn precipe en la scienca stilo (interligo, homsimileco, antikveco, motivis k. a.). Kaj nun al la *belliteratura stilo!* Ni esploros la saman tekston, resp. temon priskribi ene de romano aŭ novelo. Memkompreneble la stilvariantoj multas senfine, kaj la verkistoj aplikas la riĉajn stileblecojn laŭ individua maniero.

Por arte efiki, ili tendencos uzi variajn stilelementojn, malpli la kutimajn kunmetaĵojn ol la maloftajn, eĉ tute originalajn subplume naskiĝintajn. La inspirita frazofluo, la maniero de teksto-teksado prezentas la trunkon de la aŭtoron karakterizanta stilo. La trafaj *stilparodioj* kaptas ĝuste tiujn stil-ilojn kaj -erojn por pliakcenti ilin; ni aludas i. a. al kolekto de *Baupierre:* Specimene.

En la sekva transskribo de la temo, estas la aŭtoro de la romano kiu parolas (ne liaj herooj) komence de iu ĉapitro.

> Super la ŝipo amasiĝis nuboj, purpurrandaj de la krepuska suno. La pruo foj-foje eksaltis iomete por daŭre, konsekvence plugi la Mediteranean maron. La rigardon baris facila brumo, nur ie-tie ekbrilis ŝaŭmantaj ondokrestoj, super ili foraj montokonturoj estis imageblaj . . . Aglo-okuloj de la nigrabuklaj helenoj same esploris iam, jarmilojn antaŭe, desur iliaj ŝipetoj ĉu videblas ia bordo? La aŭdacaj! Kiom malmulte ili sciis pri la maro, pri la profundaĵoj, pri

ĝiaj sekretoj, pri ĝiaj animaloj! Premis angore ilian koron la malheliĝanta vespero; kiaj misteraj estaĵoj aperos el la profundo? Ĉu homecaj aŭ monstraj, amikaj aŭ teruraj? Flanke de ilia ŝipo kvazaŭ homaj vizaĝoj: ludemaj fokoj ŝovis en la salan aeron la kapon, scivoleme turnis sin post la antikvaj ŝipanoj, siblis kaj kriĉis, eble por averti, aŭ male, por logi ilin al sekretaj rifoj, kiu sciis? Nokte, sur la sekura bordo ĉirkaŭ la bivakfajro jam serene fluis iliaj vortoj pri la misteraj marloĝantoj: feoj? feinoj? Iu gapis la fiŝovostojn, la sopiro vidigis virinajn mamojn, certe belegajn de amemaj feinoj; ho! respektu ilin fratoj vi bravkoruloj...kaj rakontoj sekvis rakontojn, plektiĝis la mirinda reto ĉirkaŭ la magie mistera mondo. Revis la filoj de l' aŭroro homara, ravitaj de la sorĉa, vinkolora maro... kiel ĝi igis nin revi pri tempoj iamaj. Sonorigo! Ek al vespermanĝo!

Kelke da diferenco de la aliaj stiloprovoj: elvokivaj bildoj, emocioj kvazaŭ senpere venantaj de la rakontanta aŭtoro, atmosferon humoron kreantaj vortsekvoj. Abundas adjektivoj, da frazoj malpli la asertaj, sed aperas la aliaj frazospecoj, eĉ elipsaj, ankaŭ miksitaj frazoj kompleksaj. (La enkonduka parto de la lasta teksto kompreneble ne apartenas strikte al la aliformita originalo, ŝerpita de *P. Giunio— M. Ĝivoje:* Sekretoj de la marestaĵoj, Zagreb, 1960. p. 110—111.)

La fervora meti-praktikanto ricevas nun *„hejman taskon":* ĉizu la literaturan kapablon pere de belliteratura *dialogo inter viro kaj virino,* prilaborante la saman originalon kiel parton de (neverkinda) novelo. Se vi trovos vian skribaĵon sukcesinta, sedu ĝin al nia redakcio. Por la plej bonaj ni aljuĝos libropremiojn, krom publikado. *Limdato:* 1. junio 1978.

Ervin Fenyvesi

recenzoj - recenzoj

„La morto de la ĉielarko"

Endre Ady: „La morto de la ĉielarko."
Elektitaj poemoj kaj artikoloj. Eld. Hungara Esperanto-Asocio. 1977. Prezo: 10,80 ned. gld. (Por Hungario 40,— forintoj.)

Ni, la legantoj, senpacience atendis tiun ĉi libron. Kelkajn poemojn de Ady, tradukitajn al Esperanto, ni jam legis en diversaj ĵurnaloj. Lia eta artikolo *„Hungara problemo"* elokvente konvinkas nin, ke li ne nur simpatiis al Esperanto, sed vere deziris realan decidon de la monda lingva problemo.

Tiu poeto kun profunda, saĝa rigardo, ankoraŭ en la jaro 1911. modeste mencias: „Pri miaj poemoj, do pri miaj plej propraj kaj plej karaj aferoj mi ne parolas: kelkajn el ili oni tradukis al angla, franca, itala, germana, dana, rumana, nederlanda, serba, armena lingvoj, eĉ al la hebrea kaj Esperanto."

Kaj nun antaŭ ni kuŝas la libro de Ady kun elektitaj poemoj kaj artikoloj, tradukitaj Esperanten. „La morto de la ĉielarko" aperas iomete malfrue, sed estas ĝoje, ke per ĝi la esperantistoj solene omaĝas la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de tiu hungara talento.

Grandega estas la kreado de Ady, sed per la 42 poemoj kaj 10 artikoloj, prezentitaj en kronologia vico, la legantoj povas preskaŭ vidi evoluon de la poeto.

La enhavo kaj formo de la poemoj ĉiam estas en perfekta unueco. Plezuro estas la legado de poemoj kiel *„Plori, plori, plori"* (tr. K. Kalocsay), *„Batalo kun la Grandsinjoro"* (tr. K. Kalocsay), *„Neĝmontoj kaj riveroj"* (tr. K. Kalocsay), *„De Er' ĝis Oceano"* (tr. Rados), *„Sango kaj oro"* (tr. Fejes) kaj *„La stelo de steloj"* (tr. Baranyai).

La poemoj el „La morto de la ĉielarko" bonege *reflektas* rican emocion kaj racian filozofian penson de Ady. Egale ravas la legantojn la muziko, la bildoj, la metaforoj de la simbolaj poemoj, kiel *Neĝmontoj kaj Riviero* kaj klara logiko en la poemoj kiel *Sango kaj oro:*

„Mortas ĉio kaj forpasas ĉio,
salajro, gloro, kanto, rango,
sed vivas oro kaj la sango ..."

(Tr. Fejes)

Dank' al tradukarto de Kalocsay kaj bonaj tradukoj de la aliaj tradukistoj, la legantoj sukcesas vidi kaj eksenti la briladon de tiu ĉi hungara literatura diamanto.

La artikoloj en la libro estas vera malkovro. La libro estas adresita antaŭ ĉio al eksterlandaj esperantistoj, kiuj ne bone konas la rican kreadon de Ady, eble tial la tradukitaj artikoloj montras elokvente la ardan revon de Ady por interpopola kunlaborado. La artikoloj respegulas alian flankon el la naturo de Ady — lia malamo al la naciismo *(„Morto de naciismo")* kaj senlima sopiro por pli bela, pli justa mondo.

Ĉiujn artikolojn, krom *„Hungara problemo"* (tr. K. Kalocsay) tradukis Vilmos Benczik. Li sukcese interpretis la akran, polemikan, anhelan stilon de la originalo.

En la eseo „Endre Ady" Kalocsay substrekas la rolon, kion ludis Leda en la vivo de la poeto. Ni bedaŭras, ke en „La morto de la ĉielarko" ne eniris iuj el la belegaj amaj poemoj.

Kalocsay sukcese skizas en la eseo la gravajn momentojn el la kreado kaj vivo de Ady, por tio ankaŭ helpas la postvortoj de Benczik kaj la notoj, sed estus pli bone, se en la antaŭparolo la redaktoroj pli detale priskribus la epokon kaj historiajn cirkonstancojn en kiu vivis Ady kaj ankaŭ prezentus la librojn kiujn li aperigis. Tiel estus pli plena la ekkono de Ady — de lia kreado kaj vivo.

Malgraŭ tio, per *„La morto de la ĉielarko"* Ady atingas Esperanto — oceanon, kaj la esperantistoj ekĝuos el lia talento.

Georgi Mihalkov

Poezio el Oriento



El la japana moderna poezio. Antologio, kompilita de Mine Yositaka, tradukita de Miyamoto Masao. 114. p. 19 cm. Eldonis: L'Omnibuso, Kyoto, 1977.

Jen nova, surprize multinforma verko el Oriento: ĝi enhavas 95 verkojn de 59 japanaj poetoj de la dudeka jarcento. Tiu kvanto vere ebligas al la legantoj ekhavi sufiĉe konturitan bildon pri la poezio de tiu fora lando, kiu dum la lasta jarcento trakuris vojon konsterne longan; startinte en plena feŭdismo ĝi okupas nuntempe trian lokon en la ekonomia konkuro de la landoj en la mondo. Do, kvankam Miyamoto insistas ke la elekto surhavas la stampon de lia persona gusto, ni ne povas ne konsideri ĝin reprezenta antologio.

La vicon de la poetoj malfermas la konata *Mori* Oogai, kaj fakte oni renkontas verkojn de ĉiuj japanaj poetoj iom konataj en Eŭropo. Tamen, la plimulton kompreneble konsistigas poetoj, pri kiuj ĝis nun apenaŭ ni aŭdis. La temaro de la poemoj estas tre vasta — normala afero en tia kolekto —, tamen kun facile rimarkebla prefero al sociaj kaj politikaj temoj, prezentitaj el la vidpunkto de maldekstrulo: supozeble tio ŝuldiĝas al la persona sinteno de la tradukinto.

La poemoj estas bonaj, kvankam la plej multaj efikas iom fremde je la unua rigardo, sed versamanto post plurfoja lego ĉiam trovas la „elsendlongon" de la poeto. La japana poezio de nia jarcento ensorbis multon el la atingoj de la moderna poezio de Eŭropo, sed samtempe ĝi ankaŭ konservis sian originalan tonon kaj vidmanieron, kaj pro tio ĝi ne ĉiam estas simple alirebla por Eŭropa leganto. Foje-foje oni ĉagreniĝas ankaŭ pro iom statistika ĉeesto de iuj poetoj. Ĉu havis sencon inkluzivi en la volumo *Anzai* Huyue, se oni povis lin prezenti per la sola poemo *Printempo*, kies *plena* teksto estas la jena: *„Trans Tataran Markolon forgiris en zefiro fluge, ha, unu papilio."*

La supre aludita fremdeco tamen ne ŝuldiĝas nur al la originala japana vidmaniero. Bedaŭrinde mankas en Esperanto establiĝinta normo por tradukado de moderna poezio, kvankam modeloj en la originala verkaro ne mankas: *La infana raso, Ŝtupoj sen nomo, Esploroj, Memkritiko.* Tamen, la kremo de tiuj atingoj ne kristaliĝis normo, kiel tio okazis siatempe pri la normoj de la klasika poezio. Eble mankas iu persista kaj iom diktatorema *Kalocsay* por fari tion?

Pro la manko de tiaj normoj la poezia lingvaĵo de *Miyamoto* malhavas la tujan elvokivecon, ĝi portas sur si la stampon de eksperimentado. Tio ne estas lia kulpo, sed fontas el la nuntempa senkohezieco de la Esperanta poezio, kvankam, mi devas diri, foje-foje li surpaperigas ankaŭ versojn iom tro facile kovitajn.

Tiu ĉi ne tre dika volumo estas frukto de tre granda entrepreno, kaj kiel tia ĝi ne povas esti perfekta. Sed ĝiaj meritoj grave superas la mankojn: la tradukoj de *Miyamoto* alportas al ni aŭtentikajn sciigojn pri la moderna poezio de lando, kiu rajte kalkulas pri interesiĝo ĉe ni ĉiuj.

Malfruiĝinta romano

Oka Kazuta: Matenruĝo. La juneco en la tridekaj jaroj. Originala romano. 191 p., 19 cm. Eldonis: L' Omnibuso, Kyoto, 1976.

Tiu ĉi romano, atinginta nin iom malfrue, estas eble la plej ampleksa originala prozaĵo, aperinta dum la lastaj jaroj. Sed ĝi suferis malfruon ne nur pro la malrapida funkciado de la poŝto inter Japanio kaj Hungario: ĝi estis finverkita jam en la jaro 1935, kaj bezonis atendi kvardek jarojn por eldoniĝi.

Matenruĝo estas tipa verko de la intermilita laborista Esperanto-literaturo, kun ĉiuj ties virtoj kaj malvirtoj. *Barthelmess, Weinhengst* — al tiu ĉi vico nun oni aldonu *Oka.* Tiu literaturo plenumis siatempe tre gravan rolon, ĝi servis kiel edukilo por la laboristaj esperantistoj kaj ligis ilin al la movado. Eĉ, tiuj verkoj havis certan influon al la ĉefa — burĝa — tendenco de la Esperanta literaturo, stimulante tiun ekatenti pri la socia realaĵo, kaj pri la maljustaĵoj, kiuj konsistigis tiun realaĵon. Sed ĝia efiko estis nur nerekta: tiu literatura tendenco mem ne kreis verkojn temprezistajn, unuavice pro la ĝenerale aplikita tro didaktika prezentmaniero. (Elstara escepto estas Emeriko *Baranyai,* kaj iasence Eŭgeno *Miĥalski.)*



Pro tio la malfrua apero por tiu ĉi romano montriĝas tre malavantaĝa. La priskribo de „la juneco en la tridekaj jaroj", la batalado kontraŭ la faŝismo en Japanio, povas veki intereson nur kiel historia-socia dokumento pri tragedia epoko de fora lando, sed apenaŭ kiel literaturo. Ĝi estas tute certe kara libro por tiuj veteranoj, kiuj ĉu en Japanio, ĉu en Eŭropo partoprenis en la lukto kontraŭ la faŝismo, sed nur pro persona nostalgio.

Oni ne miskomprenu min: al neniu mi volas malkonsili legadon de tiu ĉi libro. Ĝi donas sufiĉe klaran bildon pri la situacio de la maldekstra movado en la antaŭmilita Japanio, kaj kiel tia ĝi estas vere tre interesa legaĵo. Sed estas tute neeble apliki al ĝi niajn nunajn kriteriojn pri romano.

Ni esperu, ke tiel malbonŝanca sorto estonte ne trafos Esperantajn verkojn.

Adekvata Shakespeare-traduko

William Shakespeare: Epifanio aŭ kiel vi volas. Teatraĵo. Tradukis: William Auld. Eldonis: Eldonejo Kardo, Glasgovo, 1977. 71 p., 20 cm. Prezo: 9,— ned. gld. (Ĉe la libroservo de HEA: 50,— forintoj)

La granda angla dramverkisto estas „bonŝanculo" en Esperantujo: liajn verkojn interpretis al la Internacia Lingvo tiaj majstroj, kiel *Zamenhof, Rossetti, Newell, Kalocsay* kaj nun *Auld.* Dum poemojn oni povas ankoraŭ fuŝtraduki al Esperanto, dramon de Shakespeare eblas jam interpreti nur almenaŭ perfekte. Kaj tiu ĉi traduko de Auld estas tia.

La dramo mem estas supozeble konata al ĉiuj legantoj, kaj tiamaniere oni konscias ankaŭ pri la grandiozeco de la traduka tasko. *Epifanio* estas — almenaŭ lingve — pli plurdimensia, ol ekzemple *Hamleto.* Intelektaj aludoj miksiĝas en ĝi kun trivialaj eldiroj, alta poezieco kun plateco. Kaj krome, duono de la dramo estas verkita en prozo.

Kaj Auld trovis adekvatan Esperantan veston por ĉiuj dimensioj de la stilo. Veston ne Kabe-ece elegantan kaj leĝeran, nek gravmiene pezan, sed veston adekvatan, kiu foje brilas, foje modeste grizas, ĉiam laŭ la bezono. Speciala ĉarmo kaj merito de tiu elasteco: neniam oni spertas rompon, la transiro inter la diversaj stiltavoloj, kaj ankaŭ inter verso kaj prozo, estas ĉiam natura, nerimarkebla.

Oni aldonu ankoraŭ, ke tute mankas en la traduko versoj cerbostreĉaj kiam oni bezonas rompi al si la kapon por diveni la signifon. La tuto legiĝas, kiel bona ... nu, ne prozo, sed kiel tre bona poezio. La recenzanto povas nur aliĝi al la fina kanto de la *Pajaco* kaj deziri al la tradukinto, ke

... aplaŭdoj venu en diluvo!

Vilmos *Benczik*

Nekompreneblaj absurdaĵoj

Lorjak: Transe. Originala romano. Eldonis: Fondumo Esperanto. 110 p. 20 cm. 30 finnaj markoj.

Per sia romano „Neologisme", Lorjak jam enŝovis sian nomon en la liston de aŭtoroj verkintaj senpretendajn, „nur" amuzajn romanetojn. „Neologisme" estas vere sprita; tial la leganto, instigata de scivolemo malfermas la volumeton titolitan „Transe", kiu de paĝo al paĝo malvarmigas la legemon. Kaj kun granda bedaŭro ni konstatas: jen denove verkisto, kies talento elĉerpiĝis post la unua verkaĵo. Espereble, la sekvan fojon Lorjak pruvos la kontraŭon.

El la fonto de nekutima — eĉ, absurda — psikologia „trovaĵo" flueta das la historieto. Viro kaj virino, kiuj ne suspektas la ekzistadon unu de la alia, ĉiunokte — dum dormado — kredas sin esti la kontraŭa persono: temas pri Pariza skulptisto, Serafen Grejunet kaj San Franciska benzinputistino, Barbara Smallsmell. Sed ne sufiĉas, ke Barbara sin sonĝas esti Serafen kaj Serafen siaparte Barbara; plie, ambaŭ travivas ĉiujn internajn kaj eksternajn okazintaĵojn de l'vivo de sia „dua memo" — kio rezultas aron da strangaĵoj, eĉ pikantaĵoj, ja Serafen kaj Barbara reprezentas la du malajn seksojn. Eventoj indaj je aventur-, detektiv-, seks- kaj kriminalromanoj konfuzigas la vivon de l' ĉefrolantoj (amaj pasioj, ĵaluzo interveno de la amerika „scienca seksologio" por solvi per strangaj metodoj la problemojn de geamantoj, sursceniĝo de gangsteroj, homforraboj ktp.) sed la kaŭzoj kaj sekvoj de okazintaĵoj restas en mallumo.

Kial okazis tiuj nekompreneblaj absurdaĵoj, tiuj longege, enuige priskribitaj aventuroj? Ne eblas scii. La „psikologia problemo" neniam solviĝas. Jen kiel finiĝas la romano: Barbara kaj Serafen volus ekscii, ĉu vere ekzistas la imagita-sonĝita „alia memo". Tial ili ambaŭ decidas veturi per aviadilo, unu en Parizon, alia en San Franciskon. Sed bedaŭrinda akcidento metas punkton post ilia vivo, trancante samtempe la pluan scivolemon de l' leganto. La du maŝinoj, renkontiĝas en la aero duonvoje inter Eŭropo kaj Ameriko, kunpuŝiĝas kaj falas brulantaj en la maron, neniigante ne nur la inkubsonĝojn de Barbara kaj Serafen, sed ankaŭ la eblecon, ke iam senvualiĝos la sekreto de tiu „psika duobliĝo".

Do, resumante: ideo, kiu povus naski interesostrecan historion, male naskas komplikan, konfuzan, enuigan agadon, rolatan far nekarakterizitaj, neindividuitaj, malagemaj personoj; kaj ĉio ĉi priskribita per peza, foje-foje malfacile komprenebla, neĝuebla — malbona — stilo.

„Neologisme" rekomendas sin mem; la romaneton „Transe" la recenzisto ne kuraĝas rekomendi.

Zsuzsa *Varga-Haszonits*

SALO-DISŜUTILO

Tipoj:

STA/3 HDTL
STA/4 HDTL
STA/5 HDTL



Teknikaj indikoj:

Tipo	Enhavo-kapacito m^3	Neta-pezo kg	Ŝarĝo-kapablo kg	Tuta pezo kg	Kamiontipo rekomendita
STA/3 HDTL	3,4	1030	3600	4630	D—452 ZIL—130 +
STA/4 HDTL	4,0	1050	4800	5850	+ +
STA/5 HDTL	5,0	1080	6000	7080	+ +

— Serie fabrikata (3,4 m^3) tipo.

— Fabrikataj nur laŭ mendo. Tiujn porti estas bezonataj aliaj kamiontipoj kun konvena ŝarĝ-kapablo.

La salo-disŝutilo estas dum kelkaj minutoj metebla (aŭ demetebla) sur platformo de kamiono, pere de teleskopa kvarpiedo. Ties alteco estas regulebla per mana kranko.

Interne de la cisterno helica transportilo kaj deaksa frakasilo diserigas kaj dozadas la salon je grama precizeco. La instalaĵo estas teleregebla el la ŝoforkupeo. La hidraŭlikan mekanismon provizas aparta motoro.

Ŝuto-larĝeco: modulebla je 2, 4, 6 kaj 8 m.

Ŝuto-kvantoj: reguleblaj laŭ gradoj de 10, 20, 30 kaj 40 g/m^2 — helpe de aparta aŭtomatismo — sendepende de la vetur rapideco. Laŭnecese eblas elŝuti eĉ pli grandajn kvantojn.

La disŝutado estas multe variebla, modifante la rotacion krome per aliigo de la eliga tubo. Antaŭ en aŭ dorsen veturante egale eblas disŝuti.

Turnante la ŝut-diskon ĉirkaŭ siaj horizontala kaj vertikala aksoj, eblas disŝuti ekzemple sub sia verturilo aŭ precize alŝuti sur malvasta zono, ekz. sur vojorandon.

TRÖSZT KÖZGÉP

KÖZGÉP

Közúti Gépellátó Vállalat

Entrepreno pri ŝose-konstruaj maŝinoj

H-1734 Budapest, xx., Haraszti út 277.

Tel.: 278-250, Telex; 22-4035

Zsolt Gáll

INTER DU HORIZONTOJ

„... ne, ne la tristo tuŝas min, sinjoro! Aŭskulti la oceanon, tiu alispeca movo devigas deĵeti fieron, perfidi la sonĝon: naive ludi en la spaco kaj enlasi la naturon inter niajn ostojn! Ĝia aparta impeto signifas nur belan pantomimon por fremdulo, sed kiu surmariĝas ĉiutage, ĉiuhore, tiu eterne sentas, kial muĝas la oceano, kial ĝi kantas kiel la fajro en soifa kaj sovaĝa prerio ... La maljunaj fiŝkaptistoj scias, kion efektive kunportas la kriĉanta vento, bronza sunbrilo en infinita maro, kie sub la ondoj la vivo kaj morto pasas ne pli ludema, ne pli terura, ne pli mensoga, ne pli demona, ol inter surteraj muroj ... Ja koralo ekzistis antaŭ ol ŝtono, iam ankaŭ ĝi atendis ... kaj kion admiras turistoj en helena statuo-silento: ĉu la blindige blankajn ŝtonojn aŭ tiun diecon, kiu akuŝis sian mondon kun krudaj kaj spicitaj filozofioj?! Ĉar ne nur homo scipovas kredi, pensi pri frenezaj momentoj. La homo defalis, debatiĝis en la ombron de l' arbo kaj tralikiĝas kiel kruda lumo tra la ŝutro, senĉese ofendante la tenebron ... Sinjoro! La nura vento de la oceano preskaŭ brulstampas, ĝi estas sufoka, kreviga ... la vento ŝatas spiti, ĝi estas malsata je viktimoj, ĝi ekflamigas la ĉielon kaj tanas la animon de la fiŝistoj! Ĝi — la erarinta filo ... Kaj nur staras la fremdulo sur la bordo li nur subridas, nur ĝuas, kiam la suno ardas super la oceano: ŝipoj, mevoj, la urbo estas malproksime ... Ĉu vi sentas, sinjoro, kiel tremas la ŝipo?! Tiu metal-insulo estas plena de fajropompo: ĝia korpo estas trapenetrita de homa precizeco ... cent kaj cent iluminitaj bovokuloj, malantaŭ kiuj maldorme impetas serena homa mensogo (ĉar oni ne kredas je la vero, ankaŭ mi devas mensogi, nur tiel eblas reveni al la vilaĝo). ... Mi vidis en Texas, kiam la *tornado* ŝiris stratojn kun ebrio de malsatiĝintaj soldatoj, dume en la ĉambro la geavoj sakris, ĉar la *week-end* ne sukcesis, kvankam ĝi estis por ili nur ripetiĝanta promenado laŭ la rivero ĝis la monumentoj: rideto kaj saluto, rusa salato ... (ili estas malbona horloĝo, ili volas morti honeste)... Kaj la ŝipo nur naĝas, boras la oceanon, kvankam ĝi estas infinitezima kvanto, sed unu haveno ĉiam ĝin atendas ie, tiu ŝipo estas misio el trans la oceano kaj ĝi venas kun misteroj de transa bordo... Inter la vento kaj ŝipo vivas stranga ludo: ili estas ĵaluzaj unu pri la alia. La vojo signifas kriman krisignon por la ŝipo, iri kaj iri, sed la vento ne konas vojon, nur akson de l' astroj, kaj ĝi nur dancas, dancas ĉirkaŭ la tero ... eble ĝia sango estas tiu, kiu frapas la fenestrojn por montri grimacon al la dormantoj, oferi katarakton de nudeco ĉe droninta lumo ... La ŝipo kaj oceano, ili ambaŭ — dioj!... Kiel en la *rue Ponthieu:* ĉiu konas la junе ravan Clea — ŝi iam laboris kiel florvendistino, sed nun ŝi vendas la propran floron. Okazis, ke oni vokis ŝin nur por paroli, sed la vivisekcio malkoncentras plie —, dum la rapsodia Leila regis la straton! Koloraj bluzoj, tremantaj karnoj ... ĉio signifas kulpan kuron, konfuzon, konjektojn, konkuron kun la tempo, strato, kun la tuta urbo ... kaj sterilan voĉon por tiuj kelkaj gastoj, kiuj malkovris tiun malkaran restoracion por pasigi la sufokan antaŭtagmezon ĉe glaso da ruĝa vino; por almenaŭ unufoje ne imiti la perversecon de la kvartalo: najbaro kaj najbaro — kvadraturo, meĥanika medio kun grandegaj oreloj, muroj ... kiam vespere oni enlitiĝas kun edzino kaj saluto, kaj plu aŭskultas, sondas sonoron agitiĝantan en najbaron... Sinjoro! La tuta mondo estas — kanto!... Vi verŝis vermuton en la glason kaj ĝi tentas kiel ventrodancistino, por rifuzi, forgesi ... minutoj sub ĉarlatanaj taktoj! En la glaso — brileto kaj ritmo, dronas la vango, la ŝipo tremas en la infinita oceano ... Je via sano, sinjoro!... Sur la ferdeko, kiel hejme: surkuregi kaj sterniĝi inter la diotimaj kverkoj de tiu monteto, kiu estas preĝejo por la urbeto, kiu vekas amon, mensogon, spiton, kie la fratoj Durell levis murdan manon unu kontraŭ la alia (ĉar ili ne povis decidi, ĉu la tero — kiu signifas nur klopodadon, ja oni devas kreski kune kun la arboj ĝis la ĉielo —, ĉu la malgranda Vilmont ...). La urbeto preferas klaĉojn, miton al la malamata vero. Ĉar ili trovas, ke la vero estas bela, dia, sed ĝi ne donas nigran panon!... Kaj la povra pano komprenis malrapide — kiel frenezuloj, kiuj kalkuladas muŝojn, kaj la timo ĉiam pli kaptas, regas ilin, ĉar ili vidas, ke la senprudentaj muŝoj povas pasi al la plafono —, kaj ŝia vizaĝo iĝis ĉiutage pli griza, pli amara: la erozio de la urbeto efektive mortigis ŝiajn filojn! Ili estas la vento de oceano, ili malamas senmovon, kaj la urbeto ŝajnis pli sterkodora ... Hoj, sinjoro! Baldaŭ la nokto cedos al la tagiĝo.. Kaj morgaŭ mi devos morti kaj reviviĝi en nova urbo..."

LETERKESTO

Al pluraj el Francio, Latvio, Brazilo: Viaj konstatoj pri foje en HV aperintaj „novaj" vortoj, ne aŭ nur malfacile troveblaj en E-vortaroj, plejparte pravas, kaj ni akceptas viajn instigojn, laŭeble eviti tiujn. Ni aldonas, ke laŭ nia propra redakcia principo, kiel vortara bazo servas la Plena Vortaro; neologismoj, eventuale fakaj vortoj, eĉ se troveblaj en fakterminaroj, devas ricevi — ĝenerale — gloson klarigan, piednoton. Tamen dum la redaktado fojefoje povas okazi, ke aŭtoro aŭ redaktoro forgesas, ne tiun regulon, sed rimarki la fakton, ke iu aŭ alia vorto ne troviĝas en PV, kaj *lia kono* pri ĝi devenas *el iu alia* vortaro. Ni persiste strebas aldoni gloson pri tiaj, eventuale bezonataj vortoj, kiel videble plurloke en la numeroj de HV.

Jiři kaj Hilda Kořinek, CS, Ústí n. L.: laŭ via peto ni publikas la dankesprimojn el via letero:„Nia unua vizito al Hungario, kie ni admiris la ĉefurbon, Balatonon, urboj Győr, Debrecen k. a., ne povis sukcesi sen helpo kaj ekstrema gastameco de s-anoj Julio Ulm, pastoro Jozefo Lukáts, en Debrecen d-ro Simon Boldizsár, Jolánka Mucsy kaj fratino Klara en katolika knabin-liceo. Ne konante la lingvon ni estus perdintaj sen ilia gvido. Ni neniam forgesos la E-klubojn en Budapeŝto kaj Mosonmagyaróvár, nek tiujn 16 tagojn."

Revenu ofte al ni, karaj amikoj!

László Czimber, Hung., Pécs: Viaj por- kaj priesperantaj pensoj, meditadoj enhavas multajn pravajn konkludojn kaj pripensindaĵojn por la movado; ni klopodos iel konigi kaj lanĉi la *jam* realigeblajn — ja ne ĉia sprita kaj valora ideo ŝajnas tia. Sur la E-libromerkato komencas aperi freŝtonaj, modernaj romanoj, kaj originalaj kaj tradukitaj, samkiel vi konsideras tion bezonata. Ankaŭ le E-preso progresas ekuzante modernajn revuo-manierojn, mem HV novigos sin tiele; ekzemple la *Lingvaj Ludoj* akiris grandan eĥon. Tamen ne atendu, ke E-revuoj — nuntempe — konkuros kun grandaj bildrevuoj. En *diversaj* landoj troviĝas jam E-teatroj, junularaj programoj, pop-kluboj kaj -kantistoj, -diskoj. Sed la geografia diseco de nia movado — per si mem gravega trajto — kompreneble metas barojn antaŭ ties sukceson, kaj ĝuste tial ne subtaksu la gravecon de amasaj renkontoj: tie prezentas sin la E-publiko, kiu altiras la amuzigajn artistojn. — Diskutebla ideo: por „interpreti" en E-o, se bezonate, *slangon*, vulgaraĉan, studentan aŭ alian socitavolan lingvaĵojn, estu uzotaj specialaj pre- kaj sufiksoj!? Prefere verkistoj sentus ties bezonon, se jes, trovos eble laŭ tiu propono, eble alimaniere la konvenajn rimedojn, nia literaturo abunde pruvis ja tion: i. a. vd. en nro 77/5 fare de O. Haszpra arkaikecan tradukon de la mezepoka *„La enfermita reĝedzino"*. Ni atendas viajn pluajn observaĵojn.

Stanislaw Pietrzak, PL, Piwniczna: Vi proponas malŝarĝi la tro multflankan prepozicion DE por eviti malklarecon — intenco prava. Vi rekomendas uzi ON, kiam temas pri *objekta* komplemento, do „treni azenon" signifus „trenado on azeno" anst. „de azeno"; oni uzu ES (finaĵon de *ties)* por indiki *posedanton*, do „treni azenon de mastro Paŭlo (posedanto)" formiĝu „azenon es mastro Paŭlo". Estas forte dubinde, ĉu la problemon solvos tiaj neologismoj, laŭ nia opinio jam kontraŭ-Fundamentaj. La problemo *„genitivus objectivus"* jam ekzistis en la klara lingvo latina, vivas plu en la latinidaj lingvoj, tamen estis ĉiam solvebla per konvena frazformulado; eblas ankaŭ anstataŭigi la prepozicion DE per alia pli preciza (en, el, pri, ktp.). Aliflanke: la multaj sencoj en DE estas ege malfacile logike distingeblaj en tro oftaj kazoj; sekve prezentus sin eĉ pli da problemoj kaj eraroj, se gramatikaj katenoj postulus tre precizan distingon ekzemple inter uzado de ES, ON, DE. Vidu la oftajn erarojn ĉe DA! Tamen ni ne volas bari ties diskutadon.

Petro Polišĉuk, SU—Uzbekistano, Taŝkento: *koran gratulon* je la 50 jara jubileo de via partopreno en la E-movado! Via entuziasmo estas vaste konata: en fokuso de nia movado en Centra-Azio, la multaj tradukoj el uzbekaj trezoroj, la spritaj artikoloj kaj poemoj, luktantaj por altaj ideoj, ĉiuj-ĉi igis vin de multaj amata, grava persono en la internacia movado. Sukcesplenan kaj longan vivon, forton kaj sanon al vi *deziras HV kaj la estraro de HEA.*

Zbigniew Tomanek, PL, Elblag: dankon pro viaj trafaj rimarkoj koncerne la reklambildojn en HV. Vere ili restis jam enuige la samaj: ni strebos, ke la anoncantoj regule ŝanĝu ilin, ankaŭ pro ilia propra intereso.

Al multaj: la redakcio nek resendas, nek responsas pri ne petitaj kaj ne publikitaj manuskriptoj, kvankam ni intencas sendi responde nian rimarkon pri ili. — *Por la manuskriptoj* validas la ĝeneralaj presejaj kondiĉoj: sur bona (ne travidebla) papero tajpi laŭ maldensaj vicoj (tn. 2-vica), ĉiuflanke konvenaj marĝenoj. Ni antaŭdankas ties plenumon.

Korespondi deziras

Kluboj: Magnitogorsk, Studenta E-Rondeto „Magneto" kun leteramikoj, resp. garantita. SU—455 023, Oktobrskaja 28—110. — E-societo „Aŭroro" (21—38 j.) kun tm.. BG—4260, *Topolovo*, distr. Plovdiv. — Klubo de Int. Amikeco, gelernantoj (12—15), pĉt. E. france, ruse. SU — 213722 *Jornovka*, Mogilovsk. obl., Škola KID. — E-kluboj de Kulturdomo (15—23 kaj 9—14) gejunuloj pĉt, ktm, bk, H—3060 *Pásztó* Műv. Közp. — Politeknika Studenta E—Rondo „Finfine" (19—25) pĉt, ktm, PL—61—209 *Poznan*, Witold Dobrowolski, Os. Oswiecenia 66m14. — Mezlernejanoj (15—17) de Elizabeta *Mičhalak* E-instruistino (23). PL—25—034 Kielce, ul. Granitowa 14.

Reciprokaj vizitoj: mezaĝa paro kun Bp-aj geedzoj, pro baldaŭa alveno: ges-roj *Rayner*, Anglio, *Barrow*-in-Funess, Cumbria, „Holligarth" 1. Prospect Rd. — George *Gurbala* (31) kemia inĝ. dez. renkonti jam dum UK-Varna: PL—31—816 *Kraków* 39. POB 35. — Maria *Czopek* (22) med. laborantino, pri literaturo, klas.- moderna muziko, turismo, teatro, bk., gr-diskoj. PL—30—900 *Kraków* 47, str. Teligi 20/57.

Interŝanĝas: ktm. pm, bk, s-ro Helmut *Bein* (40) DDR —409 *Halle-Neustadt*, Block 147/2. — Ktm, libroj, revuoj, sonbendoj ktp. Anatolo *Ionesov* studento (21), SU—703 000 *Samarkand*, Uzbekio, ul. Sovetskaja 53. — F-ino Makuškaitė *Siguté* (17) stud., bk, pm, diskoj, SU—Litovio, *Anykičiai*, Turgaus gt. 7. — Inĝ. G. I. *Ševčenko*, pm bk, libroj, revuoj. SU—320 000 *Dnepropetrovsk*, ul. Libknehta 15, kv. 32. — E-literaturon, revuojn, ins., glumk. kolektas, kun seriozaj en tm. Endel *Pajula* SU—202 131 *Viru-Jagupi*, Estonio. — Pm. neŝtamp., ins. glumk, E—ŝtampoj, gazetoj, libroj, s-ro Jan *Sigda* (48) PL—27—200 POB 42, *Starachowice*. — Hung. Vivo nrojn bezonas el 1961, 1965—67 j. kontraŭ E-libroj, sov. pm, gr-diskoj ktp SU 202—900 *Viljandi*, Meeme 16. Estonio, s-ano Rein *Kiviaru*.

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: d-ro Jozefo Németh

9-a numero:

LÁSZLÓ SCHÓR

1-a premio. »*Magyar Sakkvilág*« 1928.

Mato en 2 movoj! (komencos Bl.)

Bl.: Rg6, Dé3, Ta1, Th2, Kf2, Ĉf5, Ĉg1.
Ng.: Rf1, Dd2, Kb1, Ĉb3, a2, d6, f3, g7 (7+8)

Limdato de la solvo: ***post aŭpero 15-a tago!*** Sendota al Redakcio (sur la koverto „ŜAKO"). La solvo de la 8-a problemo: ŝlosilmovo estas: 1. *Ké4!* Ĉiujare ni donos premiojn en 3 okazoj (po 2 pecoj).

Pro la bonaj solvoj de la problemoj 5-a kaj 6-a gajnis libropremiojn per lotado:

Kalju *Lillepuu* (Ranna Pst. 4. 202900 *Viljandi*, Sovetunio) kaj Lőrinc *Bata* (H—8640 Fonyód, Fürdő u. 9.)

* * *

Ŝak-grandmajstro Lajos PORTISCH en Kalocsa.

Centran klubon de esperantistaj ŝakludantoj vizitadis L. Portisch internacia grandmajstro, multfoja landa ŝakĉampiono, multfoja kandidato de mondŝakĉampioneco — 9-an de Decembro 1977. La mondfama majstro prelegis pri siaj travivaĵoj antaŭ la interesuloj.

Samtempe D-ro J. Németh prezidanto de EŜGH transdonis por L. Portisch la membrolibron de HEA (Ŝak-Grupo) Post tio okazis simultana seanco, en kiu Portisĉ gajnis 21 tabulojn. Kontraŭ li gajnis Lajos Nagy — kaj atingis remion (egalon) László Németh.

ŜAKLEKSIKONETO (9)

EŜLI-festivalo. Esperanta Ŝak-Ligo Internacia regule aranĝas internacian festivalon. Ĝis nun okazis en Ĉeĥoslovakio, Italio. La jubileanta Ligo (20 jara!) sekvontan festivalon aranĝos en 1978. j. en Varna (Bulgario). Samtempe ĝi okazos kiam la Kongreso de UEA kun riĉa fakprogramo. Hungaraj interesuloj skribu al rubrikestro, eksterlandanoj skribu al sia landa EŜLI-peranto.

L. Portisch transprenas la membrolibron de HEA.
(fotografis István Greksa)

LINGVAJ LUDOJ

RIKOLTO DE MAGIAJ KVADRATOJ

Nia redakcio riĉevis 34 magiaĵojn diversnivelajn. Oni povis sperti, ke la ludantoj oferis multe da tempo kaj energio por tiu distriĝo. Krom la amuzaj horoj tiu kaprompado estis fruktodona: niaj kunludantoj ekkonis multajn maloftajn vortojn kaj pruvis la uzeblecon — eĉ eksterordinaran riĉecon — de nia lingvo ankaŭ sur ĉi tereno. Nur pene ni sukcesis elekti la apudajn palindrom-kvadratojn; la ceterajn ni sendas al ĉiuj niaj kunludintoj, ke ili ekkonu unu la alian por ludi plu. Ni esperas, ke iam eblos aperigi ilin — kune kun aliaj lingvaj ludoj — en aparta kajereto. La verkintoj de la jenaj 8 magiaj kvadratoj estas laŭ alfabeta ordo:

1.: Wolfgang LOOSE (FRG),

2—3.: Tibor PAPP (Hungario),

4—5.: Adolf STAŇURA (Ĉeĥoslovakio),

6.: la sama ĉe Edit VELŐSY (Hungario) kaj Algis VIZGIRDAS (Litovio).

7—8.: Algis VIZGIRDAS (Litovio).

Gratulon al la ludintoj, kaj aparte al la kreinto de la plej interesa (8-a) palindrom-kvadrato.

Per lotumo libropremion gajnis: A. VIZGIRDAS kaj E. VELŐSY.

Imre *Szabó*

1./	2./	3./	4./
OKSID	RAKET	TORAK	KAJAK
KRAMI	AMALE	ORAMA	ARAKA
SAVAS	KAJAK	RATAR	JARAJ
INARK	ELANA	AMARO	AKARA
DISKO	TEKAR	KAROT	KAJAK

5./	6./	7./	8./
TRENI	TORAK	MALAM	LIGIL
RATIN	OMEGA	AZILA	IMAMI
ETATE	REFER	LIGIL	GALAG
NITAR	AGEMO	ALIZA	IMAMI
INERT	KAROT	MALAM	LIGIL

LA MIRAKLO KAJ ĜIA VIDANTO

Rajdantoj nudaj hastas fluge tra ĉiel-bluo, la rano vidas tion kaj ekkvakas: ...

La daŭrigon de poemo de Sándor Weöres (1913—), elstarulo de la nuntempa hungara liriko, vidu en la horizontala 1. kaj vertikala 1. vicoj! La tradukinton ni kašis sub la vertikala 18. Ensendi sufiĉas nur tiujn menciitajn vicojn, ĝis la 1-a de majo. Inter la solvintoj ni lotumos valorajn librojn.

HORIZONTALE: 1. *La tria verso de la poemo.* 13. Kaŭzo aŭ principo de ies komenciĝo. 14. Rilata al prezento de detala studado pri scienca temo. 16. Vendendajo. 17. Aparato el du puloj: unu fiksa kaj unu libera (R). 19. Streĉi buŝon kun ĝojaj voĉoj. 20. Kemiaj simboloj de erbio kaj titanio. 22. Sankta birdo de antikvaj Egiptanoj (R). 24. Ankaŭ la aero estas tio (R) 26. Magia objekto ŝirmcela. 29. Parto de kadro (!). 31. Post pluvo ne tretu .... on! 33. Taĉmento de soldatoj (R). 34. De la Suno plej malproksima punkto sur la orbito (R). 36. Klasika japana dramo en la mezepoko. 37. Profesio de Zamenhof. 40. Kvar — per romiaj ciferoj. 41. Disĉiplaro (R). 43. Pseŭdonimo de Stanislaw Karolczik (1890—?). 44. La asocio de esperantistaj instruistoj. 46. Epiteto de monto kun egaj ŝtonoj. 48. Lagego. 50. Tapiŝo el plektita pajlo, junko ktp. (R). 52. Sufikso por instrumento. 53. Sveda redaktoro inter 1897 kaj 1901 de „Lingvo Internacia" (Paul, 1807—1958). 55. ZEU. 57. Rivero kaj urbo en Finnlando ĉe lago Inari. 59. Rivero enfluanta Volgon ĉe Gorkij. 60. Ekmontriĝo. 62. Latina diftongo. 63. Galgusta (R). Malproksima. 67. A!. 68. Verkanta. 70. Bele kantanta, fringospeca birdo (R). 72. Rapidege paŝi. 75. Komunumo de infanĝardeno (R). 77. Ne volas renkonti iun. 79. Arseno kaj uranio.

VERTIKALE: 1. *La kvara verso.* 2. ... Pola Aŭtuno. 3. Epiteto de junulo dum maturiĝo (R). 4. Pluraj mezepokaj rusaj regnestroj. 5. Tio estis iam ĉi. 6. Plenkonfida, senĝena (R). 7. ZOA. 8. Mode sed ne tute (!). 10. Signo de pasinta tempo. 11. Ŝveligi pilkon. 12. Metodo — sen vokaloj (!). 15. Tiel agas ofte la kartludantoj. 18. *La tradukinto* (kun komenclitero de baptonomo). 21. Enpiki sub la haŭton desegnaĵon (R). 23. Barko, ŝipeto (R). 25. Pozitiva elektrodo. 27. Montaro inter Eŭropo kaj Azio. 28. Scienco pri moralo (R). 30. Ne ĉi tie. 32. Argileca mineralo uzata kiel farbo. 35. Granda komerca kunveno (R). 38. Efektive ekzistanta (R). 39. Tute egale al la alia. 42. Tia lingvo estas ekz. volapuko, ido, ktp. 45. Malstrikte. 47. Kian kvanton? 49. Membraro (R). 51. Dekonduki iun de io. 53. Rado por levi akvon (R). 54. Produktaĵo de vulkano. 56. Malpravas. 58. Al betulacoj apartenanta arbo (kun art, R). 61. Enmetis. 64. Ora — sed iom pli multa (!). 66. Slava virnomo. 69. Miksita UEA. 71. Movigi boaton (R). 73. Japana versformo el 31 silaboj (R). 74. Universitato dum UK. 76. Belega verbo de homo (R). 78. Signoj de Vatikanaj kaj Austriaj aŭtoj.



Lavanga enigmo

Ĝi komenciĝas per unu litero kaj en ĉiu linio oni aldonas unu pluan literon, samtempe miksante la lokojn de la literoj, ĝis oni venos al la lasta — ĉefa — vorto. r=radiko.

.	finaĵo de adverboj
. .	trinkaĵo (r)
. . .	mallongigo de Someraj Esperanta-Tendaroj
. . . .	hejmo de birdoj (r)
. . . . .	poemo (r)
. . . . .	loko okupita per armeo (r)
. . . . .	malgranda ideo
. . . . .	rampulo
. . . . .	nia idealo

Adolf *Staňura*, Ostrava, ČSSR

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: *Vilmos Benczik*

Responda redaktoro:
d-ro István Nagy

Arta redaktoro: *Éva Farkas-Tatár*

Redaktoraro:

Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.

Ĉefkunlaborantoj:

Mihály Gergely Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony.

Redakcio: Budapest VIII.,
Kenyérmező u. 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio

Responda eldonisto: Tibor Vaskó

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96 162 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj)
Ft. 48.—, al eksterlando krome
Ft. 9,60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA,
H—1389 Budapest P.O.B. 149

Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7.— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

77-7004 Somogy m. Nyomda 3350
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro

Indexszám: 25 377

ISSN 0018—7704





Produktas:

SZATMÁR BÚTORGYÁR (MEBLOFABRIKO)

4700 Mátészalka, Felszabadulás útja

Telefon: 62 – Telex: 73-233



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ĜANGEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért